


EL POPOLA ĈINIO

中國報道

3 1986





Paštejo en mateno

Foto de JŪ SUJĈU

Enhavo

POR LA 35-JARA JUBILEO DE LA ĈINA ESPERANTO-LIGO:

La nuna situacio de la ĉina Esp-movado	2
Hujucz kaj Esperanto	6
POR LA 71-A UK: Dua oficiala komuniko	18
SUR NIA LIBROBRETO: Egoismo kondukas al faŝismo	22
POR KOMENCANTOJ: Freŝa floreto sur la ĉina poezia scenejo	25
ESP-NOVAĴOJ	20
Progresas la ĉina internacia kredita kaj investa korporacio	28
MALFERMITAJ URBOJ: Hajnan — trezora insulo en la Suda Ĉina Maro	14
TIBETO HIERAŬ KAJ HODIAŬ (14): Nacimalplimulto en Tibeto	50
Fizikkulturo de ĉinaj laboristoj	39
Sporto beligas la homan figuron	43
Memore al la popolaj muzikistoj Nje Er kaj Ŝjan Ŝinghaj	46
Juna pentristo el kamparo	58
Kaprico de la pluvo (mikronovelo)	65
VOJAĜO TRA ĈINIO: Kunming, printempa urbo sur altebenaĵo	31
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Islamo en Ĉinio	48
Moskva baletto floras en Pekino	36
EL REALA VIVO DE ĈINIO: Dommastrino kaj edzino	62
AMUZO	23
KURANTAJ AFEROJ	26
ĈINLINGVA KURSO	67
SUR LA KOVRILO: Jaŭ-a knabino	Foto de JAN ĜIN
INTERNE DE LA KOVRILO: Paŝtejo en mateno	Foto de JU SUĴĈU
INTERNE DE LA DORSKOVRILO: Emajlita bronza elefanto kun vazo surdorse	
SUR LA DORSKOVRILO: Gruo sub bananarbo (ĉinstila pentraĵo)	de U DONGKUJ

JARABONTARIFO	Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00		
Aŭstralio	\$A	14.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	13.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugalia	Esc	1100			
Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 8.00 US\$ 10.00 Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 5.00 US\$ 6.50											

LA NUNA SITUACIO DE LA ĈINA ESP-MOVADO

de ZHANG QICHENG*

Jam 35 jarojn ekzistis la Ĉina Esperanto-Ligo. Ne estas sensignife, ke ni observu kaj analizu la nunan situacion de la ĉina Esp-movado okaze de la 35-a datreveno de ĝia naskiĝo.

Nun la ĉina Esp-movado estas senprecedence prosperanta. Tio estas bone konata kaj ne bezonas pruviĝon per multaj ciferoj kaj fenomenoj. Tamen, kial ĝi povas prosperi kaj kiaj faktoroj favoras por ĝia prospero, kion ekspliki ja estas nia devo.

Antaŭ ĉio mi volas montri, ke nia registaro efike subtenas nian aferon pro tio, ke ĝi bone konas la signifon kaj utilecon de Esperanto. Multaj politike gravaj personoj lernis Esperanton en sia


juneco, iuj el ili eĉ lernis ĝin en malliberejo, tial ili hodiaŭ ankoraŭ havas intiman senton al Esperanto, kiu iam donis al ili esperon kaj kuraĝon. Aliaj gravaj personoj, kvankam ne lernis Esperanton, tamen dank' al sia inteligenteco, konas ĝian esencon kaj alte ĝin taksas. Ekzemple, post sia vizitado al nia malgrandskala Esp-ekspozicio en 1963, marŝalo Ĉen Ji, la tiama vicĉefministro kaj ministro de eksteraj aferoj, ekhavis grandan intereson pri nia lingvo kaj proponis okazigi en Ĉinio universalan kongreson de Espe-

* La aŭtoro estas ĝenerala sekretario de ĈEL kaj tiu de Amikoj de Esperanto kaj komitatano de UEA.



En 1963 vicĉefministro Ĉen Ji vizitis la ekspozicion de Esperantaj eldonaĵoj dum la Unua Ĉina Esperanta Labor-kunveno.

LA ĈINA ESPERANTO-LIGO



La fondkunveno de la societo "Amikoj" de Esperanto"

ranto. Kaj ĝuste dank' al lia forta subteno, Radio Pekino komencis disaŭdigon en Esperanto. Krome, ankaŭ multaj fame konataj personoj estas varmaj simpatiantoj de Esperanto, pri kio la plej bona atesto estas, ke nia societo Amikoj de Esperanto jam havas pli ol 130 membrojn.

Due, la nuna situacio de nia lando donis tre favorajn kondiĉojn al la disvolviĝo de la Esp-movado. Post la dek-jara ĥaoso de la "kultura revolucio", aperis politika situacio de stabileco kaj solidareco en Ĉinio. En la dek-jara ĥaoso nia Esp-movado stagnis, sed la nuna situacio ĝin revigligis, ĉar Esperanto kvankam ne estas "danĝera lingvo", tamen neneigeble, ĝi ne povas ekzisti kaj disvolviĝi en danĝera medio.

Nun la ĉina registaro praktikas la pordmalferman politikon en eksteraj aferoj kaj disvolvas amikecan interrilaton inter Ĉinio kaj aliaj landoj surbaze de egaleco kaj reciproka avantaĝo. Pli kaj pli multiĝas internacia interkomunikado inter Ĉinio kaj aliaj landoj, kaj pli grandan rolon ludas nun Ĉinio en la internaciaj aferoj. Sub tiuj cirkonstancoj Ĉinio deziras pli multe koni la mondon, kaj ankaŭ la mondo — Ĉinion. Sendube, Esperanto povas fari nemalgrandan kontribuon por akceli la interkompreniĝon kaj amikecon inter la popoloj ĉinaj kaj alilandaj.

En la lastaj jaroj, Esperanto trovis, en la juna generacio de Ĉinio, siajn amantojn, kio evidente estas utila al la disvolviĝo de la ĉina Esp-movado. Milojn kaj dekmilojn da ĉinaj gejunuloj interesas Esperanto, lingvo kun nobla idealo kaj facila lernebleco. Kompreneble ne eble ke ĉiuj lernantoj fariĝos fidelaj esperantistoj, sed almenaŭ parto el ili jam decidis sin dediĉi al nia afero. Tiel, foriĝis nia maltrankvilo, ke al ni mankas daŭrigantoj por la Esperanta afero, kaj ni povas kun memkonfido kredas, ke la torĉo de Esperanto povos esti transdonita generacio post generacio en Ĉinio.

Ankaŭ ĝojinde estas, ke Esperanto komencis kombiniĝi kun scienco kaj tekniko. La Esperantaj sciencistoj kaj teknikistoj de Ĉinio klopodas enkonduki Esperanton en la scienc-teknikan kampojn, dume iuj el la scienc-teknikista rondo entuziasme lernas Esperanton. Fondiĝis la Sciencista kaj Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj. En la kunveno por celebri ĝian 1-an datrevenon, Lu Ĝjaŝji, prezidanto de la akademio faris varman paroladon, laŭdante la rolon de Esperanto en scienco kaj tekniko.

Ankaŭ emfazinde estas, ke Esperanto disvolviĝis ne nur inter la hanoj, la plej grandnombraj en Ĉinio, sed ankaŭ inter multaj naciminoritatoj. En la Unua Ĉina Kongreso de Esperanto okazinta

POR LA 35-JARA JUBILEO DE ĈEL




Prezidanto de "Amikoj de Esperanto" s-ro Ĉu Tunan (la dua de dekstre) kaj prezidanto de la sveda parlamento s-ro I. Bengtsson (la tria de dekstre)

en la lasta aŭtuno partoprenis esperantistoj el 14 naciminoritatoj, inter kiuj estis ujuguroj el Ŝinĝjang. Estas interese, ke onidire por ujuguroj estas pli facile lerni Esperanton ol la hanan lingvon, tial Esperanto altiras al si pli kaj pli multajn adeptojn.


La supre diritaj faktoj pravas, ke la ĉina Esp-movado nun disvolviĝas profunden sur pli solida bazo.

Estas menciinde ankaŭ, ke nia movado ricevis grandan subtenon internacian. En 1980 UEA



S-ro Lu Ĝjaŝji, prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, donas parolon en la kunveno okaze de la unua datreveno de la fondiĝo de la Sciencista kaj Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj.

La aŭtoro (la dua de dekstre), Chun-Chan Yeh (la tria de dekstre) kaj alilandaj s-anoj dum la 70-a UK



akceptis ĈEL kiel sian landmembron. Ekde tiam ĈEL kaj UEA havis intiman kaj fruktodonan kunlaboron, kiu sendube estas valora helpo por ni. Krome, ankaŭ helpemaj esperantistoj kaj Esperantaj organizoj ĉu de nia najbaro Japanio, ĉu de aliaj landoj en foraj Eŭropo, Ameriko kaj Oceanio ĉiuflanke nin helpas. Estas superflue diri, ke nia gazeto EPC kaj Esperanta disaŭdigo certe ne povas akiri tiel elstarajn atingojn sen subtenado de niaj perantoj, legantoj kaj aŭskultantoj de ĉiuj landoj. En tiu ĉi flanko, estas necese menci, ke krom la rilatoj inter ni kaj la esperantaj organizoj kaj individuoj de Jugoslavio kaj Rumanio, nun inter ni kaj tiuj de Sovetunio kaj aliaj orienteŭropaj socialismaj landoj, iom post iom restariĝis la rilatoj interrompitaj portempe pro la konata kaŭzo. Tiu ŝanĝiĝo multe favoras al ni ambaŭflanke.

Sendube, en nia laboro ankoraŭ troviĝas multaj mankoj. Ĝeneraldirite, nia lingva nivelo estas ne alta. Al ni ankoraŭ mankas bonkvalitaj esperantistoj, kompetentaj kursgvidantoj kaj altnivelaj verkistoj. . . Unuvorte, ni devas iri tre longan vojon por havi vere potencon Esp-movadon.

Tamen, estas sendube, ke niaj atingoj estas okulfrapaj kaj nia perspektivo brila, malgraŭ la mankoj en nia laboro. Mi ne volas diri, ke tiujn atingojn ni ŝuldas sole al ĈEL. Ne, tute ne. Mi devas diri, ke tion oni devas atribui al la kuna laboro de la esperantistoj kaj Esperantaj organizoj tra la tuta lando. Por ĈEL, tiuj akiritaj atingoj kaj solvendaj mankoj ja estas fortaj instigoj por daŭrigi nian aferon pli fruktodone. Ni klopodos ne

nur per vortoj, sed ankaŭ per praktikaj aktivadoj por danki al niaj en- kaj eksterlandaj amikoj, kiuj simpatias kaj subtenas nin. Tio, mi pensas, ĝuste estas ilia sincera deziro al ĈEL, kiu eniris en sian 36-an jaron.

Junaj uĝuraj esperantistoj en la Unua Ĉina Kongreso de Esperanto



HUJUCZ KAJ ESPERANTO

de ŜAŬ BIN


“Ĉu Esperanto estas utila aŭ ne?” La demando estas ankoraŭ diskutata hodiaŭ. Neniu povas frue fini ĝin, ĉar ĝi koncernas la longan homan historion kaj la malfacile antaŭvideblan estontecon. Ĉi tie mi rakontos travivaĵon de iu persono, kaj tio eble helpas ĉiun diskutanton objektive pripensi la demandon.

La persono estas neniu alia ol la ĉina kultura eminentulo Hujucz, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Tutlanda Popola Kongreso, prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.

Jam en la 30-aj jaroj li estis influa en la ĉina kultura rondo ĉefe pro sia fama broŝuro “Unu Semajno en Moskvo” aperinta en aŭgusto 1931. Ĝis oktobro de la sekvanta jaro la broŝuro havis kvin eldonojn, kio estis malofta en la malnova Ĉinio. Ĝi priskribis, kiel la aŭtoro ricevis helpon de iuj samideanoj de Moskvo dum sia septaga res-

tado en tiu urbo, post kiam li forlasis Francion en januaro 1931 por reveni al sia hejmlando. En tiu tempo la ĉina registaro malebligis ĉiajn informojn komunikiĝi inter Ĉinio kaj Sovetunio, ke la ĉina popolo ne povis koni la batalon kaj vivon de la sovetia popolo. “Unu Semajno en Moskvo” rompita la blokado, tial tuj kiam oni unuafoje aperigis ĝin en sinsekvaj numeroj de iu gazeto, ĝi vekis atenton de la vasta legantaro. Multaj progresemaj junuloj sciigis la aferon unu al alia kaj kun granda intereso legis ĝin.

Hujucz diris en la antaŭparolo: “Sovetunio estas en transformiĝo. Ĝian estontecon neniu povas scii. Sed rigardate hodiaŭ, la Oktobra Revolucio kreis jam multajn miraklojn.” Lia broŝuro prezentis novan laboristan loĝkvartalon, grandan teatron, altlernejon, teksejon, tritikan truston, elementan lernejon, infanvartejon. . . ĉiuj tiuj estis vivoplenaj. Tiam junaj intelektuloj de Ĉinio ser-



Hujucz kaj veteranaĵaj ĉinaj esperantistoj



Hujucz

ĉis inter diversaj "ismoj" por trovi taŭgan vojon por ŝanĝi la ĉinan situacion. La objektiva pri-skribo pri la postrevolucia Moskvo ardigis la aspiron de multaj homoj pri nova sistemo kaj nova socio kaj klare montris al ili novan vojon.

Akompanate de sovetiaj esperantistoj, Hujucz sukcesis vojaĝi sep tagojn en Moskvo per la internacia lingvo. Por danki la samideanojn pro ilia helpo, li skribis en Esperanto sur la titola paĝo: "Al moskvaj gekamaradoj, kiuj volonte gastigis, helpadis, gvidadis min dum mia vizito de la ĉefurbo de la tutmonda proletaro, mi dediĉas tiun ĉi libreton." Ĝuste tiuj entuziasmaj amikoj kaj Esperanto, liganta ilin kun la juna ĉina intelektulo, ebligis al ĉi tiu verki la libreton, kiu donis faskon da lumo de espero al la duonfeŭda kaj duonkolonia Ĉinio kaj ankaŭ unuafoje kredigis al ĉinoj novan lingvon. Hodiaŭ, rememorante sian konatiĝon kun Esperanto, pluraj veteranaj ĉinaj esperantistoj ne povas preteratenti, kian edifon faris la libreto al ili. Siatempe ili estis malmultesciaj junuloj. La libro akcelis ilin lerni Esperanton kaj konvinkis ilin, ke ankaŭ la lingvo Esperanto povas konduki ilin al nova mondo.

Sed ĉe la komenco de sia lernado de Esperanto Hujucz havis alian esperon. En 1913 li, 17-jara knabo, lernis en la anglalingva prepara lernejo en Hangĝoŭ. Tiam fama ĉina esperantisto K.C. Ŝan instruis Esperanton en Ŝanhajo per korespondado. En tia lernado partoprenis ankaŭ Hujucz. Li tute aprobis la ideon de Zamenhof. Post unu jaro li eklaboris en la Komerca Eldonejo de Ŝanhajo, la plej granda siatempe en Ĉinio. Baldaŭ eksplodis la Unua Mondmilito. Hujucz publikigis "Esperanto kaj Mondpaco" en Shishi Xinbao (Nova Aktualaja Ĵurnalo), lian unuan artikolon por ĉina ĵurnalo. Li opiniis, ke mondmilito rilatas al lingvobaro. Li esperis, ke diverslandaj popoloj lernos Esperanton por efektiviigi la mondpacon.

Por realigi sian belan deziron, Hujucz unuflanke aperigis artikolojn en ĵurnaloj kaj gazetoj kaj aliflanke elesperantigis por sia popolo literaturajn verkojn de malgrandaj nacioj kaj progresemaj ŝtatoj, esperante akceli per sia malgranda forto la kulturan interŝanĝon inter la ĉina kaj alilandaj popoloj. De 1917 ĝis 1927 li verkis la artikolojn "La Nuna Stato de la Evoluanta Esperanto", "La Idealo de Esperanto kaj Realo", "Projektoj de Internaciaj Lingvoj ekster Esperanto" kaj "40 Jaroj de Esperanto" kaj la libron "La Movado de la Internacia Lingvo" kaj ĉinigis literaturajn verkojn de Rusio, Hungario, Germanio, Hispanio, Nederlando, Pollando, Bulgario, Francio, Danlando, Ĉeĥoslovakio kaj Turkio, inter kiuj estis "Rakontoj de Velkinta Folio" de V. Eroŝenko. Plejparto de tiuj tradukoj aperis en la influaj gazetoj "Dongfang" (Orienta Revuo) kaj "Xiaoshuo Yuebao" (Monata Gazeto de Noveloj) kaj havis pozitivan influon sur la novan ĉinan literaturon. Koncerne tion, multaj veteranaj ĉinaj verkistoj substrekis, ke diverslandaj literaturoj elesperantigitaj de Hujucz kaj aliaj tradukistoj vastigis ilian vidkampon.

Krom tio, Hujucz faris ankaŭ multajn organizajn laborojn. Marte de 1920 li kaj S. Ĉ. Lu, Bakin kaj rusa esperantisto Stopani fondis la Ŝanhajan Esperanto-Asocion kun li kiel respondeculo. En 1922 ili starigis la rubrikon "Esperanto inter Lernantoj" en la landinflua "Revuo por Studentoj" kaj fondis la gazeton "La Verda Lumo". En 1923 ili ekhavis la unuan ĉinan bibliotekon de Esperanto. En 1925 ili fondis vesperan kaj dimanĉan lernejojn de Esperanto. Lia tiama kunlaboranto Ĉen Ĉaŭ Jin diris: "Inter 1925 kaj 1927 Hujucz estis delegito de UEA en Ŝanhajo. Li pasigis pres-

POR LA 35-JARA JUBILEO DE ĈEL

kaŭ ĉiujn vesperojn en la asocio. Li zorgis pri ĉiuj ĝiaj gravaj aferoj. Li prenis sur sin la redaktadon, presadon kaj eldonadon. Krome, li ankaŭ instruis Esperanton. Li estis tre sindona en la laboro.”


Tamen la bela idealo kaj diligenta laboro ne povis malaperigi la sangajn batalojn inter homoj. Hodiaŭ tion rememorante, Hujucz diris: “Iom post iom mi trovis mian opinion ne prava. La mondmilito kaŭziĝis ne de lingvobaro, sed de reganta klaso, kiu praktikas imperiismon. Tiu klaso nepre volas militon, malgraŭ ke oni parolas samlingve.” Li ŝanĝis sian opinion pro tio, ke li ne nur observis la internacian situacion, sed ankaŭ propraokule vidis la elokventan fakton en la lando.

Je la 15-a de majo 1925 kapitalisto de japana kotonŝpino en Ŝanhajo pafmortigis laboristan gvidanton Gu Ĝenghong kaj vundis pli ol dek laboristojn, kio indignigis la laboristojn, lernantojn kaj aliajn urbanojn. Post duonmonato pli ol 2 000 lernantoj de Ŝanhajo faris propagandon en la koncesiitaj kvartaloj por subteni la laboristojn kaj alvokis por repreni la koncesiitajn kvartalojn. La britaj policianoj arestis pli ol 100 lernantojn. Tuj poste kolektiĝis pli ol 10 000 homoj antaŭ la pordo de la policejo de la brita koncesiita kvar-

talo sur la strato Nankino, postulante liberigi la arestitojn. La britaj policianoj pafmortigis dekkelkajn kaj pafvundis kelkdek homojn. Tio estis la fame konata “Masakro de la 30-a de Majo”. Post la masakro strikis pli ol 200 000 laboristoj, pli ol 50 000 lernantoj kaj multaj komercistoj. Sed la ĵurnalista rondo de Ŝanhajo silentis kontraŭ tio. La kruelaĵo de imperiistoj, la kontraŭimperiisma indigno de la popolo kaj la malforteco de la ĵurnalista rondo boligis Hujucz de indigno. La 1-an de junio li kunsidis kun progresemluloj de la kultura rondo pri la aktuala situacio. Tuj post tiu tago li skribis la tutan nokton. Je la 3-a de junio aperis la unua numero de “Ĵurnalo de Justeco” fondita de ili, kiu malkaŝis kaj kritikis la imperiistan perfortaĵon kaj vekis grandan simpatian de la diversaj soci-tavoloj de Ŝanhajo. Li samtempe kun siaj kolegoj de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio kaj aliaj Esp-organizoj de Ĉinio skribis protestan leteron al la mondo kaj sendis ĝin al la Ligo de Nacioj kaj diverslandaj Esp-organizoj kaj gazetaj redakcioj por diskonigi la veron de la afero.

Du jarojn poste, t.e. printempe de 1927, por detruigi la ĵus naskiĝintan laborist-kamparanan revolucionan reĝimon, Ĉjang Kajŝek, la ĉefo de la kuomintangaj dekstruloj, denove masakris la polamason en Ŝanhajo en koluzio kun imperiistoj

Hujucz vizitas ekspozicion de Esperantaj libroj.



Hujucz akceptas eksterlandajn samideanojn.



kaj reakciaj sekretaj societoj. Subite en la 12-a de aprilo la reakciuloj amasbuĉis laboristajn gvidantojn kaj manifestaciantojn kaj arestis progresemulojn. Tiutage pli ol 300 homoj estis mortigitaj, pli ol 500 kaptitaj kaj pli ol 5 000 perditaj en la urbo. Tiumatene Hujucz iris sur Baŭšanstrato kaj subite rimarkis sangon sub siaj piedoj kaj kadavrojn flanke de la strato. La terura tragedio ekscitis lin tiel forte, ke li rapidis al la redakcio de "Komerca Ĵurnalo" por skribi al la kuomintangaj altranguloj kun celo protesti kontraŭ la brutalaĵo de la reakciuloj. Li petis iujn amikojn subskribi lian leteron, kiun oni publikigis en "Komerca Ĵurnalo" tuj en la sekvanta tago.

Post la du masakroj en la du jaroj Hujucz, kredanto de pacifismo kaj anarkiismo, klare ekkonis la kruelan naturon de la imperiistoj kaj reakciuloj. Kaj li transformiĝis el senlaca kultura laboranto kaj bonkora diligenta propagandisto de Esperanto en batalanton, kiu sin dediĉas al la naciliberiga batalo kaj batalo por demokratio kaj libereco.

Hujucz rakontis al mi: "Unu tagon post la masakro de la 12-a de aprilo mia letero al la kuomintangaj altranguloj aperis en 'Komerca Ĵurnalo'. Tiam regis blanka teroro. Tiuj, kiuj oponis kontraŭ la masakro, estis ĵetitaj en Longhŭa-prizonon kaj ne povis liberiĝi. Por eviti la malfeliĉon, mi petis forpermeson de la redakcio 'Dongfang' (Orienta Revuo). Mi do ŝipveturis al Parizo, kie mi studis la internacian juron en la Pariza Universitato. Ĉiumonate mi kontribuis al la 'Komerca Ĵurnalo' per kelkaj artikoloj kaj min vivtenis per la honorario." "Sed tiam mi ne sciis la francan lingvon. Mi do kontaktiĝis kun francaj esperantistoj, kiuj serĉis por mi loĝejon, prizorgis mian vivon kaj helpis min lerni la francan lingvon." Kiel studento en Francio, Hujucz ofte partoprenis en la tiea Esperanto-movado. Dank' al tio li povis iri inter francojn, koni la francan socion kaj sendi al Ĉinio raportaĵojn pri Parizo. La Esperanto-movado de Francio en tiu tempo disvolviĝis ĉefe en la laboristaro, kio havigis al Hujucz okazajn kontaktiĝi kun laboristoj kaj daŭre kun la komunisma ideologio. Krome, li daŭre uzis Esperanton kiel ponton kun diverslandaj samideanoj, legis diverslandajn revuojn kaj vojaĝis en eŭropaj landoj dum ferioj, i. a. partoprenis en UK. Ĉio ĉi estis tre utila al li en la studo de internaciaj problemoj.

Decembre de 1930 Hujucz ĉesigis sian lernadon pro la financa malfacilo kaj forlasis Parizon



Hujucz gastis en la redakcio de "Internaciisto" en 1931.

por reveni al Ĉinio. Per Esperanto li vizitis Germanion, Pollandon kaj Sovetunion survoje al sia hejmlando. En Germanio li gastis en la redakcio de "Internaciisto", organo de la Internacio de Proleta Esperantistaro en Berlin. En Sovetunio li estis afable akceptita de lokaj esperantistoj kaj Esp-organizoj kaj restis unu semajnon en Moskvo. Kaj post la reveno al sia hejmlando li verkis la supre menciitan libreton "Unu Semajno en Moskvo".

Dum tiuj du jaroj eksterlande li aktivadis ĉiam kiel esperantisto. La Esperanto-movado tiam en la eŭropaj landoj strikte ligiĝis kun la laborista movado. Kaj tiuj movadoj multe influis kaj progresigis lian penson.

Reveninte Ĉinion Hujucz daŭre studis internaciajn problemojn kaj samtempe gvidis la ĉinan Esperanto-movadon. Ĝuste tiam japanaj imperiistoj agesis nordorientan Ĉinion kaj la ĉina popolo leviĝis por rezisti kontraŭ la malamikoj kaj savi la nacion kaj urĝe bezonis la internacian simpa-

tion kaj subtenon. Sub tiu situacio Hujucz, Loŭ Ŝiji, Ĝang Ĉjiĉeng k. a. fondis en Ŝanhajo la 3-an de decembro 1931 la Ĉinan Esperantistan Union kun Hujucz kiel ĝia sekretario. Poste la unio fariĝis ĉina branĉo de la Internacio de Proleta Esperantistaro. En la fondkunveno de la unio Hujucz pritraktis la aktualan situacion kaj novan taskon de esperantistoj. Post la kunveno la unio establis la Ĉinan Korespondan Lernejon de Esperanto, kontaktiĝis kun la Internacio de Proleta Esperantistaro kaj sendis en ĉiu deka tago la periodaĵon "Ĉinio Hurlas" al dekoj da landoj. Tiam Hujucz sin ŝarĝis ĉefe per studo de internaciaj problemoj. De tempo al tempo li iris informiĝi pri la laboro de la unio kaj doni al ĝi konsilojn. Li agis plejofte tiamaniere: li renkontiĝis kun respondeculoj de la unio en iu kvietra restoracio entreprenata de eksterlandano sur strato apud Hŭangpu-rivero en Ŝanhajo. La respondeculoj raportis al li la laboron de la unio kaj la internacian Esperanto-movadon kaj li siavice konigis al ili la ĉinan kaj internacian situacion, kuraĝigis ilin por la laboro kaj donis al ili konkretajn labormetodojn. Kaj dank' al la diligenta laboro de la membraro de la unio, rimarkinde antaŭeniris la Esperanto-movado en Ŝanhajo. La 10-an de septembro 1933 la unio okazigis la duan kunvenon de la Ŝanhaja Esperantista Ligo, en kiu la ĉeestantoj unuanime aprobis la sloganon "Per Esperanto por la Liberigo de Ĉinio". La slogano restis gvida principo de la ĉina Esperanto-movado ĝis la fino de la Kontraŭjapana Rezistmilito de Ĉinio.

La unio ĉesis aktivi en 1937, kiam japanaj trupoj okupis Ŝanhajon. Kaj Hujucz forlasis la urbon kaj iris al landinterno kaj al regionoj de sudorienta Azio por daŭre fari la progresan kulturalan laboron, sed ne estis kondiĉoj por plu disvolvi la Esperantan movadon. Nur post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949, kiam realiĝis la landpaco, Hujucz povis kune kun malnovaj samideanoj starigi la Ĉinan Esperanto-Ligon. Ili fondis la revuon "El Popola Ĉinio", disaŭdigis Esperantan elsendon al la mondo, establis la societion "Amikoj de Esperanto" ktp.

De post 1949 Hujucz funkciis kiel estro de la Eldona Administracio de Ĉinio, vicministro de kulturo, membro de la Konstanta Komitato de la Ĉina Tutlanda Popola Kongreso kaj poste ĝia vicprezidanto kaj ĝis nun kiel prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo. Dum jardekoj li ne ŝparis forton por diskonigi Esperanton en Ĉinio kaj mem faris propagandon en iuj bazaj organizoj, ke li ĉiakaŭze

meritas la nomon "pioniro de la ĉina Esperantomovado". Kaj Esperanto ebligis al li legi diverslandajn gazetojn kaj korespondi kun diverslandaj samideanoj. Abundaj informoj venintaj tra diversaj kanaloj estis referencaj materialoj tre utilaj al lia laboro.

Antaŭ ol akcepti mian intervjuon, Hujucz skribis: 1) mi eklernis Esperanton en mia juneco. Esperanto helpas ne nur koni internaciajn problemojn, sed ankaŭ lerni la anglan, germanan kaj francan lingvojn; 2) partopreno en Esp-movado helpas vojaĝi al diversaj landoj kaj ebligas korespondi kun eksterlandaj amikoj pri ŝatataj temoj; kaj 3) Esperanto ekzistas jam cent jarojn kaj certe plu evoluos en la mondo, sed ne tro rapide.

Li eksplikis siajn vortojn kiel jene: Esperanto disvolviĝos ne tro rapide, ĉar ne estas facile ellernigi la pli ol kvar miliardojn da loĝantoj en la mondo. Ĉu necesas esperantistigi ilin ĉiujn? Jes. Sed, escepte de tiuj, kiuj jesis, la plimulto kontestas. Ekzemple, multaj britoj kaj usonanoj opinias, ke multaj homoj en la mondo parolas la anglan lingvon, sekve la angla jam estas la internacia lingvo kaj Esperanto senbezona. Hodiaŭ Esperanton aprobas nur malriĉaj landoj kaj landoj kun malmultaj loĝantoj, sed estas tre malfacile por ili praktiki Esperanton pro malriĉeco kaj malmulteco de la loĝantoj. Rilate la ĉinojn, ankaŭ ili efektive deziras, ke ĉiuj lernu la ĉinan lingvon. La ĉina registaro simpatias al Esperanto, sed ĝi ne povas popularigi nian lingvon en mallonga tempo. Necesas tempo por vaste apliki Esperanton. Ekzemple, naturaj sciencoj progresis iam rapide en malmultaj landoj, sed nun en pli multaj. Tiel oftiga la interŝanĝo de naturaj sciencoj inter diversaj landoj. En la interŝanĝo oni iom post iom aplikas Esperanton kaj Esperanto povas disvolviĝi en tiu kampo. Sed oni bezonas jardekojn, eĉ pli da tempo.


Jen kiel travivis la Esperantan movadon la 89-jara aktivulo. La heroo de mia artikolo jam multe profitis el Esperanto dum sia vivo. Sed tio ne signifas, ke ĉiu homo povas havi la saman vivaĵon kaj la saman sukceson. "Ĉu Esperanto estas utila aŭ ne?" Por respondi tiun demandon, ĝuste kiel Hujucz diris, oni bezonas tempon.

Kiam tiu ĉi n-ro pretiĝis por preso, ni informiĝis pri la bedaŭrinda forpaso de s-ano Hujucz. Raporto pri la funebraj aktivadoj sekvos en la IV-a n-ro.

La Red.

LA 35-JARA JUBILEO DE ĈEL

Fotoj de niaj raportistoj




*Hujucz, prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo,
en la Tria Ĉina Esperanta Laborkunveno*

La Unua Ĉina Kongreso de Esperanto






ĈEL-laborantoj



La ĝenerala sekretario de ĈEL s-ro Ĝang Ĉjiĉeng kaj aliaj ĉinaj esperantistoj en Svedio en 1980

Ĵelezo, vicprezidanto de ĈEL, akceptas eksterlandan esperantiston.





Ĉinaj esperantistoj gastas ĉe Hujucz.



Ĉen Ĵuan, vicprezidanto de ĈEL, kaj
Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA



Li Ŝjiĝjun, konstanta konsilanto de ĈEL,
kaj eksterlandaj esperantistoj en Pekino

Hajnan – trezora insulo en la Suda Ĉina Maro


de LI ĈJANG

Fotoj de ĈJUN JAN



“La Fino de la Tero”, unu el la turismaj lokoj sur Hajnan-insulo

Tongŝi



Hajnan-insulo, kiel la dua granda insulo de Ĉinio, situas en la sudo de Gŭangdong-provinco. Origine ĝi kunligiĝis kun la kontinento de Ĉinio. En la kvaternaro la tiea terkrusto malleviĝis pro falto kaj formiĝis Ĉjongĝou-markolo, tiel ke la insulo disiĝis de la kontinento. La insulo ampleksas areon de 34 000 kvadrataj kilometroj kaj la distanco inter ĝiaj sudokcidento kaj nordoriento estas 258 kilometroj.

La Hajnan-administra Regiono prenas Hajkoŭ kiel sian ĉefurbon. Ĝi administras sub sia jurisdikcio la Li- kaj Mjaŭ-naciecan Aŭtonoman Subregionon de Hajnan, 18 guberniojn kaj urbojn kaj la insularojn Ŝjiŝa, Ĝongŝa kaj Nanŝa. La insulo havas pli ol 5.8 milionojn da loĝantoj, kiuj estas hanoj, lioj, mjaŭoj, hujoj, ĝŭangoj.

Sur la insulo staras altaj montoj, fluas belaj riveroj, etendiĝas arbaroj kaj sterniĝas ebenaĵoj. Tie troviĝas subteraj riĉfontoj. Jam trovitaj estas mineraloj fera, mangana, kupra, kobalta, stana, titana, bruna karbo, nafto, marmoro kaj aliaj pli ol 40 spe-

coj, kiuj havas ne nur grandan rezervokvanton, sed ankaŭ altan entenon. Precipe la riĉfonto de nafto kaj naturgaso estas konsiderinde granda, ĝi troveblas ne nur subtere, sed pli multe en mara fundo. Arco-kompanio de Usono boris altproduktan naftogasan puton en Jingge-marokcidento de la insulo kaj konstatis post prospektorado, ke la tiea rezervokvanto de naftogaso estas 90 miliardoj da kubmetroj. En la lasta majo la Hajnan-administra Regiono kaj la Aŭstralia CSR-petrol-grupo subskribis interkonsenton por ekspluati naftogason en la norda insulo. La ekspluatado de nafto kaj naturgaso alportos ekstreme brilan perspektivon al la ekonomia disvolviĝo de la insulo.

La marbordo de la insulo longas 1 725 kilometrojn, kun pli ol 20 000 hektaroj da malprofundaĵoj, kiuj plej taŭgas por brede salikokojn, holoturiojn, haliotojn (*Haliotis gigantea*), hipokampojn, ostrojn, kaj kulturi perlojn, ĉiuj kun alta ekonomia valoro. Kunlabore kun japanoj, la perlokulturejo de Lingŝuj-gubernio de la

Hajnan-a Li- kaj Mjaŭ-nacieca Aŭtonoma Subregiono elkulturis grandajn perlojn, el kiuj la plej grandaj havas diametron de 1.5 centimetroj, kio vekis atenton en kaj eksterlande.

En la insulo regas tropika musona klimato, kun meznombra jara temperaturo de 22°C — 26°C kaj kun jara meznombra pluvokvanto de 2 000 — 2 800 mm. Tie la suno brilas longe kaj tutjare vidiĝas nek prujno nek neĝo. La insulo havas fekundan grundon taŭgan por kulturi tropikajn kaj ekonomiajn plantaĵojn, kiaj kaŭĉukarboj, olepalmoj, piprabedoj, citrona herbo, kafarboj, kakaarboj, tearbedoj, jutoj, sukerkanoj kaj aliaj. Tie abunde kreskas tropikaj fruktoarboj, kiaj loganarboj, liĉiarboj, mangujoj, bananujoj, baŝooj, olivarboj, arbutujoj, kokosarboj kaj figarboj, kiuj originas el la loko, kaj ankaŭ durioj, akaĵuarboj, manikarujoj (*Manikara zapota*), panarboj kaj oranĝarboj, kiuj estas enkondukitaj el sudorienta Azio kaj aliaj partoj de la mondo. Inter ili estas plej famaj liĉio, mango, ananaso, panfruktoj kaj kokoso.

Sanja-haveno ĉe la suda fino de Hajnan-insulo





La Fiŝ- kaj Salikok-bredejo de Lingŝuj-gubernio entreprenata de Ĉinio kaj alia lando

Tie produktiĝas ankaŭ diversspecaj akvomelonoj, kies parto estas vendata al la landinterno kaj aliaj lokoj de la mondo ĉiujare. Hajnan-insulo estas honorita kiel "verda trezorejo" kaj "lando de fruktoj".

En la insulo kreskas plantoj tutjare, oni rikoltas rizon trifoje ĉiujare. Sed en la pasinteco, pro postĝinta kulturado la nivelo de la tiea agrikultura produktado estis malpli alta ol la meznombra nivelo de la tuta lando. En la lastaj jaroj, dank' al la paŝopostpaŝa reformado de la ekonomia strukturo en la kamparo, riĉa rikolto estis akirita en sinsekvaj jaroj kaj certgrade pliboniĝis la agrikultura produktado.

Antaŭ la Liberiĝo de 1949, krom nombro da metiejoj, la insulo havis nenian modernan industrion. Sed nun tie funkcias industriaj branĉoj de sukerproduktado, salfarado, ladmanĝaĵoj, kaŭĉukaĵoj, agrikulturaj maŝinoj, cemento, elektro kaj minekspluatado. Dank' al praktiko de la pordomalferma politiko kaj importado de avangarda teknologio,

konstruiĝis aro da modernaj fabrikoj. La industria produktovaloro kreskas jaron post jaro, novaj produktaĵoj aperas unuj post aliaj, kio montras vastan perspektivon de la ekonomia disvolviĝo.


Estas ĝojinde, ke oni jam havas rudimentan supozon pri perspektiva projekto de la insula konstruado. Laŭ la projekto, en la fino de la nuna jarcento la tuta insulo el 18 gubernioj kaj urboj estos dividita en ses ekonomiajn zonojn kun apartaj ecoj kaj en harmonia disvolviĝo, kun havenurboj ĉe la marbordo kiel la centroj:

La unua ekonomia zono prenos Hajkoŭ kiel la centron. Ĝi estas la ĉefurbo de la Hajnan-administra Regiono kaj situas en la nordo de la insulo. Ĝi distancas 18 marmejlojn de Lejĝoŭduoninsulo, kiu etendiĝas de la ĉefteritorio de Ĉinio al la Suda Ĉina Maro. Ĝi servas ne nur kiel la centro de politiko, ekonomio kaj kulturo de la insulo, sed ankaŭ kiel tiu de ĝiaj mara, tera kaj aera trafikoj kaj estas la nor-

da pordo de la insulo. Pli ol 200 fabrikoj lokiĝas en la urbo. Diversaj ladmanĝaĵoj, sukeraĵoj, kokoskulptaĵoj kaj koralfloroj, produktitaj en la urbo, vendiĝas en ĉiuj provincoj de la lando kaj sudorienta Azio. Tie oni ĉefe disvolvos turisman aferon, tekstilan industrion, elektronikan industrion, ledfaradon, meblofaradon, kaŭĉukaĵojn kaj manĝaĵ-prilaboradon. La dua ekonomia zono prenos la havenon Jangpu de Danŝjan-gubernio kiel la centron. Tie estos konstruita moderna profundakva haveno kun kelkaj ĉedokaj ankrejoj por 10 000-tonelaj ŝipoj, kaj disvolviĝos ĉefe petrol-kemiindustrio, sukeraĵ-produktado kaj konstrumateriala industrio de cemento kaj vitro. La tria ekonomia zono prenos Basŝon kiel la centron. La loko servos kiel ĉefa bazloko de industriaj materialoj kaj disvolvos ĉefe minekspluatatan industrion, metalan fandadon, agrikulturon, brutobredon kaj plantadon de tropikaj kreskaĵoj. La kvara ekonomia zono prenos Sanja kiel la centron. Tie disvolviĝos ĉefe



Kokao, kafarbo, kokosarbo kaj panarbo sur Hajnan-insulo





servaj okupoj, komerco, bredado, akvoproduktado, manĝaĵ-prilaborado kaj fabrikado de turismaj metiartaĵoj, por vigligi turisman aferon. La kvina ekonomia zono prenos la havenon Ĉinglan kiel la centron. Tie estos plikonstruita haveno por 5 000-tonelaj ŝipoj. Utiligante la kondiĉon, ke en la loko loĝas pli da parencoj de ĉinaj elmigrintoj, oni faros prilaboron de memprovizitaj materialoj, kaj laŭ specimenoj, muntadon per memprovizitaj maŝinpecoj aŭ kompensan komercon. Kaj la sesa ekonomia zono prenos Tongŝi, la administrejon de la Hajnan-a Li- kaj Mjaŭ-nacieca Aŭtonoma Subregiono, kiel la centron. Tie ĉefe disvolviĝos forstokulturado kaj alia montregiona ekonomio.

Por efektiviĝi la grandan celon en konstruado de la insulo la ŝtato donis al la Hajnan-administra Regiono grandan memstarecon en eksteraj ekonomiaj aktivadoj. Post sankcio de la Ŝtata Konsilantaro ĝi povas kunlabori kun eksterlandaj komercistoj en ekspluatado de iuj gravaj mineralaj re-

zervoj. Estas klare difinite, ke la eksterlandaj komercistoj, kiuj faras negocadon en la insulo (inkluzive de entreprenado unuopa kaj komuna, prilaborado de memprovizitaj materialoj, kompensa komerco, importa kaj eksporta negoco, teknologiaj interŝanĝo kaj importado), povas ĝui favorajn avantaĝojn. Tio donas vastajn perspektivojn al fremdlandaj komercistoj, transmaraj ĉinaj elmigrintoj kaj samlandanoj en Hongkong, Aŭmen kaj Taj'ŭan en la ekonomia kunlaboro kaj komercado.

Kiam la norda Ĉinio vestiĝas per glacio kaj neĝo, la insulo kovriĝas per verdaĵoj kaj en ĝi blivas milda vento. Tial ĝi estas rigardata kiel plej taŭga loko por vintrumado. La insulo allogas al si sennombrajn en- kaj eksterlandajn turistojn per siaj aparta tropika pejzaĝo, simplaj li-naciecaj moroj kaj multaj historiaj vidindaĵoj en ĉiuj sezonoj de la jaro.



Dua oficiala komuniko

21 XI 1985

71a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Pekino (Ĉinio) 26 julio — 2 aŭgusto 1986

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam

Adreso de LKK: p/a Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 825, Beijing, Ĉinio

Honora Komitato: La 71a UK okazos kun plena apogo de la plej altaj ĉinaj aŭtoritatoj. La Honoran Komitaton jam konsentis eniri pluraj el la plej altaj ĉinaj funkciuloj, sciencistoj kaj artistoj. Ĝian plenan konsiston ni komunikos pli poste, sed la nomo de ĝia prezidanto estas jam delonge konata: temas pri s-ro Huang Hua, la unua ĉina ambasadoro ĉe UN, eksministro pri eksteraj aferoj, nuntempe vicprezidanto de la parlamento. Li jam en februaro akceptis delegacion de UEA kaj LKK por longa kaj detala interparolo pri diversaj malfermaj demandoj kaj problemoj. Tiam intereson pri la UK montras ankaŭ aliaj Honoraj Komitatoj. En Ĉinio la Honora Komitato ludas tre aktivan rolon anstataŭ esti nur surpapera ornamaĵo de la Kongreso.

Kongresaj ejoj: Pro manko de adekvata kongrescentro en Pekino, la 71a UK disvolviĝos en pluraj institucioj. La Inaŭguro, Malfermo, Bankedo kaj Balo havos lokon en la ĉina parlamentejo, la impona Popola Halo. La tutvesperaj artaj aranĝoj okazos en diversaj teatraj salonoj, dum la ĉefaj kongresaj laboroj disvolviĝos en la pekina Scienca Halo, kie ni

disponos pri dudeko da salonoj kun kapacito de 25 ĝis 500 sidlokoj.

Ekskursoj: LKK kaj Ĉina Internacia Turisma Servo kalkulas, ke preskaŭ ĉiu kongresano deziras aliĝi al unu aŭ pluraj ekskursoj, kiuj tial abundas antaŭ, dum kaj post la kongresa semajno. Kiel videblas en la Dua Bulteno, verŝajne temos pri dudeko da ekskursoj. Tuttaga ekskurso al la Granda Muro estas planata por ĉiuj kongresanoj, kaj ĝi estas inkluzivita en la prezo de la kongressemajna restado en Pekino. Same estas pri duontagaj ekskursoj al la Imperiestra Palaco kaj Somera Palaco. Krome, eblas aliĝi al du aliaj duontagaj ekskursoj en la semajno.

Depende de la flugvojaĝo elektota, parto de la kongresanoj havos eblecon aliĝi al apartaj antaŭ-postkongresaj ekskursoj tra Ĉinio. Plimulto de ili okazos aviadile, sed kelkaj inkluzivos ankaŭ riverŝipan transporton. Estus malfacile ĉi tie priskribi ĉiujn celojn de la ekskursoj, sed oni notu, ke temas pri preskaŭ ĉiuj provincoj de la vasta lando kaj pri urboj kiel Ŝanhajo, Kantono, Wuhan, Chengdu, Kunming, Dalian, Ŝenyang, Harbin, Hangzhou, Suzhou, Nanjing, Xi'an. . . Eĉ la malproksima Lasao en Tibeto estos unu el la celoj.

Ankaŭ por kongresanoj, kiuj ne povos resti longe kaj pagi ekskursojn tra diversaj partoj de la lando, estas planataj du- aŭ tritagaj ekskursetoj senpere antaŭ aŭ post la semajno. Eĉ se oni restos unu aŭ du tagojn en Pekino post la

UK, haveblos malmultekostaj vizitoj al la kamparo aŭ granda pekina fabriko.

Loĝigo: La 71a okazos en la plej varma kaj pluva periodo en Pekino, kiam la temperaturo facile atingas 30 gradojn celsiusajn. Tial necesas loĝi en klimatizitaj hoteloj, kiuj ne kostas malmultekoste en multmiliono urbo, kiun ĉiutage vizitas pli ol duonmiliono da gastoj, LKK provizore blokis plurajn centojn de litoj en la Hotelo "Amikeco", mezklasa, klimatizita, situanta tuj apud la kongresejo. Oni rezervis kelkcenton da litoj en du aliaj hoteloj, el kiuj unu estas luksa. Ne eblas en Ĉinio, kiam temas pri eksterlandaj vizitantoj, paroli pri la prezo de nura hotela tranokto, ĉar estas devige preni tutan turisman pakaĵon, kiu krom lito inkluzivas ankaŭ 2 manĝojn tage, ĉiujn transportojn, tuttagan ekskurson, du duontagajn ekskursojn kaj ĉiujn enirbiletojn por la vidindaĵoj survoje. En tia aranĝo, unutaga restado en la mezklasa hotelo kostos (en dulita ĉambro) ĉ. 140 guldenojn. En la aliaj du hoteloj, tiu restado kostos ĉ. 200 gld. (altklasa) aŭ ĉ. 230 gld. (luksa).

Tiel UEA kiel LKK konscias, ke tio estas tamen altaj prezoj, ne pagblaj por parto de la kongresanoj. Post multaj klopodoj, oni nun sukcesis aranĝi ankaŭ malmultekostan loĝadon, disponigotan unuavice al gejunuloj kaj kongresanoj el landoj kun pagaj problemoj. Estos amasloĝejo en mezlernejo, kiu situas je kvaronhora piediro de la kongresejo. Oni loĝos tie en sim-

plaj, kvarlitaj ĉambroj. Por ĉiuj tri etaĝoj de la lernejo servas komunaj necesejoj kaj du grandaj duŝhaloj en la teretaĝo. La komforto do ne estas granda, sed ankaŭ la prezo ne altos: 10 ĝis 15 guldenoj tage. Ni disponos pri 300 tiaj litoj. En la lernejo verŝajne eblós aranĝi ankaŭ malmultekostan matenmanĝon.

Oni nun faras pliajn klopodojn por loĝeblecoj en ia meza kategorio inter la amasloĝejo kaj hotela aranĝo, sed la ŝancoj sukcesi ne estas grandaj. Plenaj detaloj aperos en la Dua Bulteno.

Vojaĝaranĝoj: Kiel pli frue anoncote, UEA aranĝos tutan aron da flugoj el diversaj partoj de la mondo al la 71a UK. Tiuj flugoj estos kunordigitaj kun la diversaj ekskursoplanoj tra Ĉinio. Ni jam pli frue menciis, ke ekz. el Eŭropo eblos flugi al Pekino kaj reen por la sumo de 2-3000 gld. Kunlaboro kun Japana Esperanto-Instituto, UEA organizos ankaŭ la vojaĝon de la japanaj kongresanoj. Ni jam delonge traktas ne nur kun la ĉina flugkompanio CAAC, sed ankaŭ kun pluraj aliaj grandaj kaj bonrenomaj kompanioj. Ni nun provas kunordigi la flughoraron kun la planataj ekskursoj, provante lasi kiel eble plej vastan elekteblon. Ankaŭ la mendiloj pri la flugkaravanoj de UEA distribuiĝos kun la Dua Bulteno.

Kotizoj: Ĉiuj kotizoj plialtiĝos la 1-an de januaro. Ili estos: Kat. 1 (ne individua membro de UEA) 225 gld.; Kat. 2 (individua membro) 187,50 gld.; Kat. 3 (kunulo/junulo/handikapulo, ne individua membro) 150 gld.; Kat. 4 (kunulo/junulo/handikapulo, individua membro) 112,50 gld.

Informoj por vidhandikapuloj: Vidhandikapaj kongresanoj ricevos, se ili aparte petas, sonkasetajn informojn pri la Kongreso.

Reklamoj kaj salonmendoj: Diversaj esperantistaj instancoj ricevis cirkuleron pri la kondiĉoj re-

klami en la kongresaj eldonaĵoj kaj mendi salonon aŭ budon dum la UK. Se vi ne ricevis la cirkuleron, sed tamen interesiĝas pri tiuj eblecoj, tuj kontaktu la konstantan adreson. La limdato por anonoj en la Dua Bulteno estas la 20a de decembro, por tiuj en la Kongresa Libro la 30a de marto kaj por salonmendoj la 1-a de marto.

Por orientiĝi en la ĉina lingvo: Laŭ saĝa sugesto de iuj kongresanoj, frazaro de la kongreslanda lingvo aperos jam en la Dua Bulteno, diference de la malnova kutimo aldoni ĝin al la Kongresa Libro. Krome, Radio Pekino planas realigi en siaj Esperanto-elsendoj praktikan kurson de la ĉina lingvo. Ĝi estas speciale intencita por la partoprenantoj de la 71a UK kaj startos en januaro.

Statistiko: Ĝis la 21a de novembro estis enskribitaj 1 054 aliĝintoj el 49 landoj. Plej forte reprezentigaĵas Japanio (176 aliĝintoj), FR Germanio (119), Francio (101), Usono (75), Korea Resp. (68), Nederlando (61), Italio (54), Finnlando (40), Britio (38), Jugoslavio (32), Belgio (31), Svedio (25), Danlando kaj Hispanio (po 19), Kanado (18) kaj Bulgario (17). La plej granda delegacio estos kompreneble la ĉinaj kongresanoj, sed ili aliĝas rekte ĉe la LKK kaj ni nun ne disponas pri tiurilata statistiko.



Solvoj de la enigmoj:

1. krajono
2. cirkelo

MONATO

internacia magazino sendependa

UNIKA REVUO EN ESPERANTO

Vere alternativa laŭ multaj aspektoj.

Unu el la plej prestiĝaj
esperanto-revuoj

Inform-riĉa, bele ilustrita.

Petu inform-materialon de:

MONATO, Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen, Belgio.

(Daŭrigo de p. 22)

bagatelaĵoj ja ne povas kovri la brilon de la premiita verko.

Recenzis **Laŭlum**

NOVE RICEVITAJ LIBROJ

GERMANA ANTOLOGIO tradukita de Wilhelm Herrmann kaj Helmut Rössler, eldonita de Bleicher Eldonejo. Formato: 12 × 19 cm. 328 p. Ĝi estas la unua volumo de la kompletigota Germana Antologio kaj entenas elektitajn versajn kaj prozajn literaturaĵojn el la periodo de 730 p. K. ĝis 1700 p. K. Prezo nemontrita.

MAKS KAJ MORITS versa rakonto por geknaboj, ilustrita per koloraj desegnaĵoj de Wilhelm Busch, tradukita el la germana de Rudolf Fischer, eldonita de F. Coppentrath Verlag. Formato: 15.5 × 19 cm. 84 p. Prezo nemontrita.

KANTOJ KARMEMORAJ kantarokun muziknotoj, kompilita de Konisi Gaku, eldonita de la Japana Esperanta Librokooperativo. Formato: 18 × 25.5 cm. 62 p. Prezo 13 gld. plus sendkosto. Aĉetebla ĉe la eldoninto (adr.: Sonehigasi 1-11-46-204 (Kobori Mansion Toyonaka), Toyonaka, Oosaka-hu, Japanio.

ESP-NOVAĴOJ

STUDENTA ESPERANTO-ASOCIO EN ĈINMEDICINA INSTITUTO FONDITA


La studenta Esperanto-Asocio de la Ĝjangŝji-a Ĉinmedicina Instituto, la unua studenta Esperanta organizo de medicina instituto en Ĉinio, fondiĝis en la lasta jaro.

En la fondkunveno la estroj de la Ĝjangŝji-a Esperanto-Asocio kaj la rektoro kaj aliaj respondeculoj de la instituto faris gratulajn paroladojn. Ankaŭ studentoj improvizis paroladojn en Esperanto pri la stato de Esperanto-movado en la instituto kaj ilia plano. Iuj studentoj prezentis programerojn Esperante.

ESPERANTA INSTRUADO EN LA FUĜJAN-A SCIENC-TEKNIKA PROGRESIGA INSTITUTO

En la dua duono de la lasta jaro, la Fuĝjan-a Scienc-teknika Progresiga Instituto funkciigis sian unuan Esperantan perfektigan kurson, kiu havas 50 kursanojn, inter ili estas sciencistoj, teknikistoj, instruistoj, medicinistoj, oficistoj kaj fervojistoj. La kurso daŭros unu jaron.

Ĝoŭ Cangman, rektoro de la instituto, kaj aliaj respondeculoj alte taksas Esperanton. Rektoro Ĝoŭ aŭskultis lecionon ĉe la kurso. Li opinias, ke Esperanto estas



Esperanto-kurso en la Aŭto-riparejo de Fuĝoŭ

lingvo multepromesa, kaj plurfoje proponis popularigi, disvastigi kaj uzi Esperanton en la scienca rondo de Fuĝjan-provinco.

ESPERANTO-MOVADO EN ĈENGDU

En la urbo Ĉengdu viglas Esperanto-movado.

En la lasta oktobro subtenate de la laborantoj de Ĉengdu-a Esperanto-Asocio, 45 lernantoj de la Njanfengŝjang-a Elementa Lernejo de la urbo komencis lerni Esperanton en postleciono tempo, kio riĉigis la postlecionan vivon de la elementaj lernantoj.

Laŭ la peto de studentoj, la Esperanto-Asocio de la Ĉengdu-a Scienc-Teknika Universitato funkciigis somerferian kurson de Esp. en la lasta jaro, kiun gvidis Li Daĉeng, ĝenerala sekretario de la Siĉŭan-a Esperanto-Asocio. La kursanoj jam posedis fundamentajn sciojn pri Esperanto. Post sia

fondiĝo en 1984, la asocio de la Universitato faris certajn laborojn kaj havas bonan renomon en la universitato. Nun la asocio havas 30 membrojn el studentoj.

En la komenco de la lasta oktobro, la Ĉengdu-a Esperanto-Asocio ankoraŭfoje okazigis konsultiĝan aktivadon pri Esperanto en strato. Kvankam antaŭe oni faris la aktivadon jam kvarfoje, tamen ankoraŭ restas nemalmultaj homoj, kiuj neniam aŭdis la vorton Esperanto. Ili venis por demandi pri Esperanto kaj iuj el ili eĉ petas tujan instruadon de la alfabeto de Esperanto.

La 9-an de oktobro de la lasta jaro la ĵurnalo "Chengŭu Wanbao" (vesperĵurnalo) publikigis anoncon, ke la Fremdlingva Klubo de Siĉŭan-provinco decidis funkciigi interkomunan aktivadon per pluraj lingvoj inkluzive de Esperanto, ekde la 10-a de oktobro, je la 19-a ĝis la 21-a kaj

La fondkunveno de la Studenta Esperanto-Asocio de Ĉin-medicina Instituto en Ĝjangŝji



Jen Esperantaj montrotabuloj pri Ĉinio okaze de kultura ekspozicio en Sante Genevieve des Bois, urbo prok-



30 minutoj ĉiuĵaŭde. Maŭ Jing, vicĝenerala sekretario de la Ĉengdu-a Esperanto-Asocio kaj ses aliaj Esperantistoj partoprenis en la unua aktivado.

NANCIE DURHAM-PREMIO POR ALIĜI AL UK EN PEKINO

Por honori la memoron de S-ino Nancie Durham kiu dum sia vivo organizis karavanojn de Eŭropo al Ĉinio, la Norĉ Jubilea Esperanto-Fonduso starigis "Ĉinan Premion" por helpi britajn junulojn viziti Ĉinion. La premio en 1986 estos £1000, sufiĉa por partopreni en la Universala Kongreso en Pekino. Bonvolu skribi al la sekretario, Norman Williams, 237, Two Trees Lane, DENTON, M34 1QL, Britio.

MEDICINISTOJ EN SCHWERIN/GDR

De la 8-a ĝis 14-a de septembro 1985 renkontiĝis 80 diversfakaj kuracistoj kaj medicinistoj en Schwerin en la nordo de GDR por partopreni en la tradicia Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco (IMEK). La ĉeestantoj venis el Bulgario, ĈSSR, GDR, Hungario, Islando, Pollando, Sovetunio kaj Svislando.

LA 2-A NIĜERIA KONGRESO DE ESPERANTO

Okaze de la 25-jara jubileo de niĝeria sendependeco, la Niĝeria *sima al Parizo. Ilin aranĝis s-roj Hugues Henry Jean Cruchon lastsemajne de sept. 1985.*



Esperanto-Asocio samtempe okazigis sian duan kongreson de la 1-a ĝis 10-a de okt. 1985 en Illeh Ekpoma. Aliĝis al la kongreso 664 personoj el 10 aŭtonomaj ŝtatoj de Niĝenio kaj eksterlandoj.

LA 46-A INTERNACIA FOIRO PRI PROFESIA FIŜKAPTADO

Sub apogo de LF-Koop kaj IKEF (Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo) kaj aŭspicio de la Itala Ekstera Komerco-Ministerio, la plej grava mediteranea profesia faka foiro pri fiŝkaptado kaj fiŝkonservado okazos la 5-an—8-an, junio, 1986, en Ankono, Italio. La organizantoj decidis inviti kiel vizitantojn, tutmondajn esperantisto-fakulojn en la kampo, por pruvi ke Esperanto ekzistas kaj taŭge funkcias por internaciaj rilatoj.

LITERATURA KONKURSO

Kultura Esperanto-Societo "Kooperativo Verda Monto" afable invitas vin partopreni en la Literatura Konkursio, organizata kadre de la Internacia Foiro de Esperanto-Kulturo (Zielona Góra 1986.05.09-15).

La konkursio havas tri kategoriojn:

La unua: por la plej bona novelo, artikolo, felietono, ks., verkita originale en la lingvo Esperanto. La temaro povas tuŝi problemojn de la internacia lingvo, esperantologio, sed rajtas kon-

kursi ankaŭ tute libertemaj eseoj, noveloj, ks.

La dua: por la plej bona traduko. Oni povas esperantigi libere elektitan tekston.

La tria: por la plej bona kanto aŭ kanzono verkita en la lingvo Esperanto.

La partoprenantoj estu malpli aĝaj ol 30 jaroj.

La aŭtoroj sendu konkursaĵojn en registrita letero ĝis la 30-a de aprilo 1986 al Jerzy Rządcki, Kooperativo Verda Monto, PL 65-568 Zielona Góra 8, SP-43. La tekstojn bonvolu tajpi kaj signi per emblemo de la aŭtoro. Aldonu informon pri kategorio de la konkursio. Bonvolu ankaŭ kunsendi en aparta fermita koverto, signita per la sama emblemo, jenajn informojn pri la aŭtoro: nomo, antaŭnomo, adreso, naskiĝdato.

Informojn petu ĉe Kooperativo Verda Monto, Jerzy Rządcki, PL 65-568, Zielona Góra 8, SP-43.



La foto montras grupon de E-kursanoj kaj estraranoj de E-societo "Fratoj Ribar" Borovo, Jugoslavio, gviditan de inĝ. Herić Aleksije kaj Dušan Adnadj.



EGOISMO KONDUKAS AL FAŜISMO

En tiu ĉi rubriko ni aperigas recenzojn pri Esp-ajoj kiujn la eldonistoj sendis al ni po-du-ekzemplere, kaj nur mencias tiujn ricevitajn po-unu-ekzemplere. Ni ankaŭ bonvenigas recenzojn faritajn de alilandaj seriozaj samideanoj kaj ilin rekompencas pro la kontribuajoj per niaj Esp-aj eldonaĵoj aŭ ĉinaj metiartaĵoj. La redakcio ne prenas sur sin la respondecon pri la laŭdoj aŭ kritikoj de la recenzantoj.

La Red.

KIUJ SEMAS PLORANTE. . . originala romano de Eva Tófalvi kaj Oldřich kníchal, eldonita de la Universala Esperanto-Asocio. Formato: 15 × 21 cm. 108 p. Prezo: 15 gld. plus 10% por sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj.

Post la Dua Mondmilito aperis, en nia lingvo, pluraj varme akceptitaj romanoj tradukitaj kaj originalaj pri barbaraĵoj kaj tragikaĵoj dum la faŝisma teroro. En tio manifestiĝis la sinteno de la esperantistaro kontraŭ la malhoma faŝismo. Sed ĉu ĉiuj vi foje pensis, ke ankaŭ inter la uzantoj de Esperanto troviĝas elementoj de hitlerismo? Tia persono estas ĝuste Bende, la protagonisto en la romano "Kiu Semas Plorante. . .", kiu gajnis la unuafojan Premion Raymond Schwartz.

En sia infaneco Bende perdis la patron, kiu volonte soldatiĝis kaj viktimiĝis, kaj poste ankaŭ la patrinon, kies vivon estingis ftizo. La orfo daŭrigis sian vivon sub la protekto de Karlo, lia patrinflanka onklo, kun envio al tiuj, kiuj ĝuas komforton kaj lukson. Li aspiris al universitata katedra poste-

no, al riĉo kaj potenco, kaj rilatiĝinte al faŝista gvidanto, li pensis: "Mi estos lia rimedo kaj li la mia. Mi helpos lian partion kaj li donos al mi parton de la potenco." Li aliĝis al faŝista partio kaj membriĝis al esperantista rondo laŭ ĝia instrukcio, por elflari kontraŭfaŝistojn. Li enamiĝis al bela esperantistino Agnesa, kiu decidis forfuĝi kune kun li kaj aliaj esperantistoj kun falsitaj pasportoj. Bende ŝanceliĝis inter amo kaj potenciĝo, kaj fine decidis denunci Agnesan kaj aliajn kaj ilin arestigi. Poste li, laŭ ordono, vidis Agnesan en hospitalo elĉerpitan post torturado, kaj lasis ŝin morti. Tiu nedezirata ago malplaĉis al la superulo kaj li estis sendita en sanatorion kiel frenezulo por atendi tie novan ordonon. Li decidis forkuri, sed estis kaptita, strangolita per maŝo kaj ĵetita en riveron.

La romano ne dividiĝas en ĉapitrojn, legiĝas kiel taglibro de la protagonisto, sen noto pri la datoj. Multe da inko estas uzita por priskribi la psikologion de Bende kaj preskaŭ mankas bildigo de la naturaj kaj sociaj medioj de la okazaĵoj. Legantoj, kiuj multe informiĝis pri la preparolata tempo, ja povas bone kompreni ĉion. Ne ekzistas denaskaj faŝistoj kaj aliaj fihomoj, ankaŭ Bende faŝistiĝis ne sen ekstera influo. Sed kial li, ne la aliaj esperantistoj, fariĝis instrumento de faŝismo? La romano montras al ni, ke egoismo kondukis Bende al faŝismo, kaj faŝismo metis finon al lia vivo.

Ankaŭ rilate al la lingvo, la aŭtoroj faris gratulindan kontribuon. La abundo de figuraj kaj sukaj esprimoj kredeble efike helpas al la progresantoj-legantoj ler-



La kovrilo de "Kiu Semas Plorante. . ."

tiĝi en uzado de Esperanto. Nur tre malmultajn preserarojn kaj plumerarojn mi rimarkis, ekzemple: en la 2-a linio sur p. 66 "de ne" devas esti legata "ĉu ne" en la 10-a linio sur p. 67 "pli granda sumo el" devas esti legata "pli granda sumo ol", en la 13-a linio sur p. 74 "en senprofundan absimon" devas esti legata "en senfundan abismon"; al la frazo "La montara kabano, kie ni tagmanĝis, estis posedaĵo de unu el dekkelkaj membroj de nia societo" mankas "la" antaŭ "dekkelkaj", ĉar temas pri difinita membraro, kaj al la frazo "Ŝi havis blondan, laŭmode kombitan hararon, kiu kronis lentugan vizaĝon. . ." oni devus aldoni "la" antaŭ "lentugan vizaĝon", ĉar temas pri la vizaĝo de la dirita virino; oni devus ankaŭ aldoni noton pri "duĉeo" neologismo ne-trovebla eĉ en PIV. La diritaj

(Daŭrigo sur p. 19)

Vian infanon ne dorlotu,
eduku ĝin, ke ĝi bone konduku.

**LUDO DE FINGROFRAPAJ
GLOBETOJ**

AMIKECO INTER BESTOJ

Respekto al la maljunuloj kaj helpo al la infanoj, ĝentileco, cede-
demo, modesteco kaj honesto —
ĉio ĉi estas noblaj karakteroj de
la homaro. Sed en la naturo ek-
zistas ankaŭ iuj bestoj, kiuj agas
simile al la homoj.

Intimaj interrilatoj troveblas
inter patrino kaj ŝiaj gefiloj en
la ĉimpanza grego. Kiam ĉimpan-
zino estas malsana aŭ vundita,
ŝia filino memvole nutras ŝin.
Post la morto de sia patrino la
pliaĝa frato aŭ fratino memvole
flegas siajn junajn gefratojn.

La maskla vulpo kutime estas
egoisma kaj manĝema. Sed, kiam
la vulpino estas graveda, la mas-
kla flegas ŝin tiel bone, ke li tute
ŝanĝis sian antaŭan karakteron.

**ĈINAJ PROVERBOJ POR INS-
TRUI INFANOJN**

Facile rektigi arbon dum ĝi es-
tas juna,
sed malfacile tion fari kun la
granda.

Oni devas bone distingi florojn,
ilin kultivante,
kaj bone koni la penson de l' in-
fanoj, ilin edukante.

Ne miru scivolemon de viaj infa-
noj,
ne silentu kontraŭ iliaj kuriozaj
demandoj.

Gepatroj estu modelo de siaj in-
fanoj,
instruu ilin per sia ago, ne per
sia vorto.

Riĉa rikolto dependas de plugado
printempa,
nobla homo kreskas el infano
bone edukita.

Ni rekomendu al niaj legantoj
interesan ludon de fingrofrapaj
globetoj. La ludo helpas lertigi
la fingran manovron.


Ambaŭ flankoj de la ludantoj
havas po tri postajn, du mezajn
kaj unu frontan globetojn, kaj
unu frapglobeton. La ludtabulo
konsistas el du simetriaj trapezoj
kunligitaj, ĉiu kun frapa, posta
kaj meza regionoj. Kaj en la
mezo estas stabejo. La frapglo-
beto devas esti metita en la fra-
pan regionon, dum la postaj kaj

mezaj globetoj en la kvin difini-
tajn sidejojn en la posta regiono
kaj la fronta globeto en la mezan
regionon (Vd. la bildon).


Ambaŭ ludantoj fingre frapas
globetojn alterne laŭ la jena ma-
niero: unue arkigi etan fingron
per la dika kaj frapi per la eta
fingro la frapglobeton, por ke ĉi
tiu karambole elbatu la meze loki-
tan postan globeton el ĝia sidejo.
Poste arkigi ringan fingron per
la dika kaj frapi per la ringa fin-
gro la frapglobeton kontraŭ du
flankajn postajn globetojn por el-
bati ilin el iliaj sidejoj. Poste
arkigi montran fingron per la
dika kaj frapi per la montra fin-
gro la frapglobeton kontraŭ la
mezajn globetojn por elbati ilin

Tabulo por ludo de fingrofrapaj globetoj

1. *Frapa regiono*
2. *Sidejoj de postaj globetoj*
3. *Posta regiono*
4. *Sidejoj de mezaj globetoj*
5. *Sidejo por fronta globeto*
6. *Meza regiono*
7. *Stabejo*



*Ludo de fingro-
frapaj globetoj*



SERIO DE INFANLIBROJ

FABELOJ DE ĈINIO



Ili estas adaptitaj laŭ pri-bestaj legendoj popularaj inter la ĉinaj popoloj. La pentristo personigas la bestojn kaj ornamas ilin per diverskoloraj naciaj kostumoj.

LA SERIO ENHAVAS:

Petolema Kaprido	183×206 mm 20pĝ. £0,65 US\$1,30 88-Es-241P
Lutro kaj Bufo	183×206 mm 20pĝ. £0,65 US\$1,30 88-Es-242P
Du Katetoj	183×206 mm 20pĝ. £0,65 US\$1,30 88-Es-243P
Brava Kolombido	183×206 mm 20pĝ. £0,65 US\$1,30 88 Es-244P
Kokido Venĝis Sian Panjon	183×206 mm 20pĝ. £0,65 US\$1,30 88 Es-246P

Kompilita kaj pentrita de ĜAN TONG

Eldonita de la ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO

Mendu ĉe: **Libroservo de UEA Perantoj de EPC**

aŭ: **Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio**

el iliaj sidejoj en la centran regionon. Fine arkigi mezan fingron per la dika kaj frapi per la meza fingro frontan globeton en la stabejon. Kiu la unua plenumas ĉion ĉi, tiu gajnas la venkon. En la ludo la postaj globetoj ne devas esti elfrapitaj el la posta regiono, dum la mezaj globetoj

devas esti enpuŝitaj en la mezan regionon, alie oni devas remeti la elpuŝintan globeton en ĝian antaŭan sidejon. Se oni okaze tuŝas globeton de la kontraŭa flanko, oni perdos unu fojon en sia ludo.

ENIGMOJ

1. Objekto longa kaj maldika,

kun internaĵo rekta kaj vesto kolora, ĝia pinta buŝo iĝas iam pli mallonga dum sia laboro. (skribilo)

2. Sur siaj pintaj piedoj ĝi staras, ĉiam per unu piedo ĝi iras. Kiajn piedsignojn ĝi lasas post si? Cirklojn unu post alia. (skribilo) (Solvo: troveblaj en ĉi numero)

FREŜA FLORETO SUR LA ĈINA

POEZIA SCENEJO

14-jara poetino Tjan Ŝjaŭfej estis neregule akceptita de la Pekina Universitato kiel studentino lastjare. La poetineto jam verkis kaj eldonis ĉu poemarojn. Ŝi, same kiel aliaj samaĝaj knabinoj, estas sana kaj vigla. Oni ne kredus, ke ŝi jam estas studentino, se oni ne vidus la universitat-insignon sur ŝia brusto.

En septembro de 1980, Tjan Ŝjaŭfej akiris premion en la Enlanda Konkurso de Poezio de Mondaj Infanoj organizita de Unesko. La premiita poemo "Bonvenigon al la bela morgaŭo" estis publikigita en la n-ro 1, EPĈ, 1981. Kune kun ĝi oni publikigis la artikoleton "Tian Xiaofei — Nova floreto en la ĉina poezio".

Tjan Ŝjaŭfej estas saĝa kaj diligenta. Kiam ŝi estis tri-kvar-jara, ŝia pliaĝa frato lernanta en mezlernejo ofte legis infanajn kantojn el iu libro al ŝi, ŝi jam povis parkerigi ilin iom post iom. Post kelkaj monatoj ŝi jam sciis legi ĉiujn ĉinajn ideografiaĵojn en tiuj infanaj kantoj. Ŝia patro rimarkis, ke la filino estas lernema, tial li havigis al ŝi kelkajn librojn de facilaj klasikaj poemoj por ke ŝi legu novajn ideografiaĵojn kaj komprenu la poemojn helpe de la patro. Kiam ŝi estis ses-jara, ŝi jam povis flue legi pli ol cent klasikajn poemojn.

Foje, la gepatroj kun ŝi vizitis la Someran Palacon. Starante ĉe la lago en la parko, ŝi vidis, ke lotus-floroj kaj -folioj facile flirta-



das en vento, ke ruĝaj kaj nigraj karpoj libere naĝas en akvo sub la lotusfolioj. Poste ŝi grimpis sur la monton kaj vidis, ke la boatoj en la lago aspektas tiel malgrandaj kiel salik-folioj. Reveninte hejmen, ŝi longe ne povis forgesi la viziton. Sub la kuraĝigo de la patro, ŝi verkis la unuan poemon — "Vizito al la Somera Palaco":

Palaco Somera sorĉite pejzaĝas,

lotusajn la florojn ornamas folioj,
ho, karpoj koloraj libere subnaĝas,
boatoj en lago aspektas folioj.


Tjan Ŝjaŭfej sane kreskas ne nur dank' al la kulturado de siaj gepatroj, sed ankaŭ de siaj instruistoj kaj geonkloj en la literaturaj kaj artaj rondoj.

LA ĈINA TOKAMAKO N-RO I AKCEPTITA DE LA ŜTATO

La tokamako n-ro 1, la plej granda eksperimenta ekipaĵo de regata nuklea fuzio en Ĉinio, akiris unuajn donitaĵojn post pli-ol-unujara inĝenierad-reguligo kaj fizika eksperimentado, kiu komenciĝis en septembro, 1984, estis oficiale akceptita de la ŝtato post ekspertizo la 18-an de novembro, 1985. La ekipaĵo atingis kaj eĉ superis la difinitajn normojn.

Regata nuklea fuzio estas unu el la plej grandaj problemoj esplortaj de la sciencistaj-teknikistaj rondoj de la tuta mondo. La ĉina tokamako n-ro I estas plenumita kune de pli ol 100 scienc-esploraj, instruaj kaj produktaj unuoj.

La ĉina tokamako n-ro 1



LA PLEJ GRANDA LIFT- PONTO FINKONSTRUITA EN TJANĜIN

La plej granda lift-ponto Hajmen de Ĉinio estas finkonstruita super la malsupra Hajhe-rivero en Tjanĝin kaj transdonita al trafiko.

La ponto estas 903.74 metrojn longa kaj 14 metrojn larĝa kun po 2 metrojn larĝa trotuaro ambaŭfanke. La centra parto estas ŝtala spano kun longo de 64 m., kiu vertikale leviĝas je 24 metroj. Sub ĝi povas trairi malpli-ol-5 000-tonelaj ŝipoj.

ORIGINALA INVENTAJO DE ĈINIO ADMIRATA EN- KAJ EKSTERLANDE

Ŭang Joŭ, fama kemiisto kaj esploristo de la Ŝanhaja Organik-kemia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, deklaris en la internacia simpozio okazigita en Ŝanhajo la 13-an de novembro 1985, ke post pli-ol-10-jara laboro, en la unua duonjaro de 1985, ĉinaj sciencistoj unuafoje plenumis la ekzamenadon de la unuaklasa strukturo al proteino de la radiko de ĉina trikosanto (*Trichosanthes kirilowii*), kies molekulo estas trioble pli granda ol tiu de insulino.

La proteino de la vegetaĵo kun originala fiziologia funkcio povas sukcese abortigi 98 procentojn de la mezperiodaj gravedulinoj kaj havas evidentan kuracefikon sur hidatid-forman moleon, malignan hidatid-forman moleon kaj eksteruteran gravedecon.

ĈINAJ ASTRONOMOJ FOTIS LA HALEJAN KOMETON

Je 12 minutoj post la 4-a en la 11-a de novembro, 1985, ĉinaj astronomoj unuafoje fotis la Halejan kometon en la regiono Kaŝi de Ŝinĝiang.

La akiritaj donitaĵoj montris, ke la heleco de la kometo estas tiu de la 8-a grado. Ĝia heleco pli kaj pli fortiĝas. La kometo nun iras en la konstelacio Taŭro kaj

proksimiĝas al nia terglobo je rapideco de 40 km. po sekundo.

102 SCIENC-ESPLORAJ CENTROJ POR DOKTOROJ EN ĈINIO PROV-STARIGITAJ

La Ĉina Administr-reguliga Komisiono de la Ĉina Scienc-esplora Centro por Doktoroj antaŭ nelonge decidis, ke oni unue starigos 102 scienc-esplorajn centrojn por doktoroj en la Pekina Universitato, Ĉinghŭa-a Universitato, Teorio-Fizika Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj aliaj 70 superaj lernejoj kaj scienc-esploraj organizaĵoj, kiuj akceptos 250 esploristojn.

ĈINAJ SPORTISTINOJ REFOJE GAJNIS LA ĈAMPIONECON EN LA VIRINA FLUGPILKA MONDPOKALA KONKURSO

La 20-an de novembro, 1985, la Ĉina Virina Flugpilka Teamo venkis la japanan teamon per 3:0 en Tokio kaj refoje gajnis la ĉampionecon en la 4-a Virina Flugpilka Mondpokala Konkurso per ĉiuj venkoj en la 7 matĉoj.

ĈINOJ GAJNIS 3 ORAJN MEDALOJN EN LA 23-A MONDA GIMNASTIKA ĈAMPIONECA KONKURSO

En la 23-a Monda Gimnastika Ĉampioneca Konkurso, okazinta en la unua tagdeko de la lasta novembro, ĉinaj sportistoj gajnis 3 orajn, 2 arĝentajn kaj unu kupran medalojn: Tong Fej gajnis la ĉampionecojn en la finaloj de grunda gimnastiko kaj rekado per 19.850 kaj 19.750 poentoj. Li Ning kaj iu soveta gimnasto paralele gajnis la ĉampionecon en la duringa ludado per 19.750 poentoj.

ĈIN-JAPANA VEJĈI-A DEFIA SERIO FINIĜIS

La 20-an de novembro, 1985 Nje Ŭejping venkis Hideyuki Fujisawa per 1 3/4 pecoj, rezulte de tio, la ĉinaj ludantoj venkis la japanajn rivalojn per 8:7 kaj tiel finiĝis la Ĉin-Japana Vejĉi-a Defia Serio, kiu komenciĝis en la 6-a de

oktobro, 1984. La venko montris gravan ŝanĝon en la *Vejĉi-a* interŝanĝo inter Ĉinio kaj Japanio.

400 mil lepruloj resanigitaj

Depost la naskiĝo de la popola respubliko en 1949, Ĉinio resanigis sume 400 mil leprulojn. Nun malaperis lepro en preskaŭ 15 provincoj kaj urboj. Ĉinio havas siajn preventajn kaj kuracajn retojn kontraŭ lepro, kie laboras 13 000 specialistoj.

En la lastaj jaroj ĉinaj sciencistoj faris profundan studon pri la vivo, trajtoj kaj infektaj vojoj de lepraj baciloj kaj alprenis serion da rimedoj por preventi kaj kuraci la malsanon. Nun Ĉinio produktas bonefikajn medikamentojn kontraŭ lepro.

AZIA KAJ PACIFIKA INTERNACIA FOIRO EN PEKINO

La Azia kaj Pacifika Internacia Foiro solene inaŭguriĝis en la Ĉina Internacia Ekspozicia Centro, kiu finkonstruiĝis en Pekino, novembro de 1985.

1 200 kompanioj el 26 landoj kaj regionoj eksponis en la foiro siajn tradiciajn eksportaĵojn, t.e., avangardajn teknikojn kaj ekipaĵojn, inkl. tiujn de meĥaniko, elektroniko, metalurgio, tekstilo, manĝaĵoj, trafiko, konstruo, energio kaj aliaj.

La foiro, kune okazigita de la Ĉina Komisiono por Akcelo de Internacia Komerco kaj la Ekonomia kaj Socia Komisiono de Azio kaj Pacifiko sub UN, ne nur montris la latentajn ekonomiajn fortojn de la koncernaj landoj kaj regionoj, sed ankaŭ donis bonan ŝancon disvolvi komercon, lerni unu de alia kaj fari interŝanĝon de spertoj.

EKSPOZICIO MEMORE AL 3 USONAJ AMIKOJ EN PEKINO

Memore al la fidelaj amikoj de la ĉina popolo, famaj usonaj verkistoj kaj ĵurnalistoj Anna Louise Strong, Agnes Smedley kaj Edgar Snow, kiu havis la 100-an, 93-an

Nje Ŭejping (dekstre) kaj Hideyuki Fujisawa post la konkurso



kaj 80-an datrevenojn de sia naskiĝo, la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj kaj Ĉina Revolucia Muzeo kune aranĝis la ekspozicion, novembre de 1985.

FENG ĜI RICEVIS LA PREMION "FRATOJ GRIMM"

Prof. Feng Ĝi, fama ĉina verkisto, erudiciulo kaj tradukisto, ricevis la premion "Fratoj Grimm" de DR Germanio en 1985 pro sia kontribuo en konigo kaj studo de la germana literaturo kaj akcelo de la amikeco kaj kunlaboro inter la diverslandaj popoloj.

"ENTOMOLOGIA MONDO" PREMIITA EN LA INTERNACIA TEKNIKA FILMFESTIVALO

La ĉina filmo (bildobendigita) "Entomologia Mondo" gajnis la unuan premion en la 11-a Internacia Teknika Film-festivalo finita la 15-an de novembro, 1985.

"Entomologia Mondo" estas kolora filmo produktita de la Pekina Scienc-eduka Filmstudio. Ĝi prezentas la aktivadon de insektoj malofte aŭ malfacile vidatan de la nudaj okuloj kaj malkovris la misterojn de la entomologia mondo.

La kvintaga festivalo okazinta en Pollando projekciis 166 filmojn de 15 landoj. Ĉinio partoprenis ĝin unuafoje.

DU GRANDAJ KAMFORAJ STATUOJ DE GIGANTOJ AL JAPANIO

Du grandaj kamforaj statuoj de

Gigantoj, 11 metrojn altaj, 5 metrojn larĝaj kaj 2.5 metrojn dikaj, estas skulptitaj de la 3-a Skulptejo de Ĉujang-gubernio, Hebej-provinco, kaj transportitaj en Japanion decembre de 1985.

La du statuoj el pli ol 27 000 kamforaj pecoj estas 40 tunojn pezaj. La skulptado elpezis 16 200 labortagojn. La statuoj kun kompakta strukturo estas stabilaj kaj vivoveraj.

Ili estos metitaj interne de la pordego de la nova Seidai-templo en la urbo Katsuyama kaj konservataj de Japanio kiel ĝia nacia trezoro.

GABONAJ DANCISTOJ EN PEKINO

Invitite de la Ĉina Prezertara Agentejo sub la Ministerio de Kulturo, la Gabona Danctrupo el 49 membroj turneis en Pekino, Fuĝoŭ kaj Ŝjamen de Ĉinio, vintre de 1985.

Ĝi estis la unua artista trupo de Gabono, kiu vizitis Ĉinion.

La tradicia negra danco ĝuas renomon pro siaj simpla stilo, konciza klarigo kaj gaja ritmo. La malicangba-danc-serio, ludita de la gabonaj artistoj por ĉinaj spektantoj, konsistas el 8 programeroj. Ĝi estas verkita surbaze de la tradicia gabona naci-danco kaj kunfandita kun modernaj dancmovoj por adaptiĝi al la nuntempa arto en la mondo. Ĝi priskribas la naskiĝon, religianiĝon, geedziĝon, funebrojn kaj aliajn el la vivo kaj moroj de la malsamaj triboj en Gabono.

Progresas la ĉina internacia kredita kaj investa korporacio



Domego de la Ĉina Internacia Kredita kaj Investa Korporacio

Pasis preskaŭ sep jaroj de post la fondiĝo de la nomita korporacio. Ĝi naskiĝis en la ekonomia reformo de Ĉinio kaj senĉese progresas pro sia iniciativo.

Ĝiaj ĉefaj taskoj estas sorbi kaj utiligi fremdlandajn kapitalojn, importi teknikon, ekipaĵojn kaj administrajn metodojn, organizi kunan entreprenadon de Ĉinio kaj aliaj landoj, investi eksterlande, plenumi ekonomian konsultadon kaj aliajn. Fari teknikan reformadon al la enlandaj entreprenoj, ekspluati riĉfontojn enlande kaj investi por ekspluatado de iuj fremdlandaj riĉfontoj estas aferoj akcentataj de la korporacio por modernigo de Ĉinio.

La plej altan aŭtoritaton ĝuas la direktoraro, kies membroj estas nomumitaj de la Ŝtata Konsilantaro. La direktoroj venintaj el diversaj partoj de la lando repre-

zentas diversajn socitavolojn. Inter ili troviĝas ministroj, provincaj kaj urbaj estroj, famaj ekonomikistoj, advokatoj, kontistoj kaj ekskapitalistoj, kaj ankaŭ personuloj en la industria kaj komerca kampoj de Hongkong kaj Aŭmen.

Por pli bone disvolvi la internaciajn fakajn rilatojn, la korporacio establis sian branĉon en Hongkong, en majo 1980, kaj oficejojn de reprezentantoj en Parizo, Tokio kaj Novjorko. Kun la prosperiĝo de la aferoj ĝiaj eksterlandaj oficejoj iom post iom multiĝos.

En la pasintaj pli ol ses jaroj la korporacio, kiel fenestro de la ĉina malferma politiko al eksterlando, praktikas iujn specifajn politikojn kaj ekonomiajn rimedojn, tiel ke ĝiaj aferoj rapide disvolviĝas. Nun la korporacio

jam fariĝis ĝenerala ekonomia ento de financo, produktado, komerco kaj servoj. Ĝiaj ĉefaj fakaj laboroj estas jenaj:

1. Fari la internacian financon aferon kaj kanalon por kolekti fremdajn valutojn.

En la lastaj jaroj la korporacio jam subskribis interkonsentojn kun pli ol sesdek fremdlandaj financaj organizoj, sorbis deponitajn fremdajn valutojn kaj emisiis kvarfoje obligaciojn en Japanio, Hongkong kaj FR Germanio. Ĝia nove establita banko jam ekfunkciis. Ankaŭ la Ĉina Investa kaj Financa Limigita Kompanio en Hongkong establita de Ĉinio kaj la Kanada Reĝa Banko komencis sian laboron. Kaj tiel la korporacio eniris en la internacian financon merkaton, kun sufiĉe bona kredito.



S-ro Jong Jijen (la unua de dekstre), ĉefdirektoro de la Ĉina Internacia Kredita kaj Investa Korporacio, akceptas la Usonan Advokatan Delegacion.

2. Organizi konstruadon de entreprenoj per en- kaj eksterlandaj kapitaloj, kolekti fremdajn valutojn, importi teknikon kaj mem investi por la enlanda konstruado.

Ĝis la fino de 1984 la korporacio sukcesis organizi pli ol dudek projektojn, por kiuj investis enlandaj entreprenoj kaj tiuj de Usono, Japanio, Okcidenta Eŭropo, Hongkong kaj Aŭmen. Escepte de apartaj projektoj, la korporacio faris certan investadon. Ĝi investis memkolektitajn fremdajn valutojn por pli ol sepdek enlandaj projektoj kaj importis por ili novajn teknikon kaj ekipaĵojn. La entreprenoj starigitaj per ĝia investo plejparte estas mez- kaj malgrandaj kaj iliaj produktaĵoj parte vendiĝas en la internacia merkato.


3. Fari luservon por teknika

reformo de entreprenoj, importi novajn teknikon kaj ekipaĵojn por klientoj.

Nelonge post sia fondiĝo la korporacio jam importis en nian landon luservon furoran en la mondo. En la lastaj jaroj tia ser-

vo progresis rapide. Krom la korporacio mem, servas ankaŭ la Ĉina Orienta Limigita Lukompanio fondita per investo de Ĉinio kaj Japanio kaj poste la Ĉina Limigita Lukompanio. Ĝis nun la tuta lua sistemo sukcesigis pli ol

Traktada salono de la korporacio



500 kontraktojn por enlandaj industriaj entreprenoj kaj minejoj, kun totala negoca valoro de 600 milionoj da usonaj dolaroj, el kiuj pli ol 150 milionoj da usonaj dolaroj estis uzitaj por importi ekipaĵojn. Nun en luservo oni ne nur importas ekipaĵojn, sed ankaŭ teknikon, kio estas bona al enlandaj klientoj.

La korporacio akceptas komisionojn de klientoj por importi teknikon kaj ekipaĵojn kaj per kontraktojn kaj importon de ekipaĵoj. Ĝi donas financan helpon al iuj entreprenoj. Nun ĝi jam importis certajn ekipaĵojn kaj teknikon por la mina, metalurgia, metal-prilabora kaj elektronika industrioj, el kiuj iuj estas urĝe bezonataj de nia lando.

4. Fari investadon eksterlande.

Konsiderante la bezonojn de la konstruado de la lando, la Ŝtata Konsilantaro sankciis, ke la korporacio faros investadon eksterlande. Ĝi esploris investajn mediojn de paperpulpulo, ligno, fosfora erco, kalia salo, sulfuro, kupra erco, fera erco kaj aliaj mineraloj, kiuj mankas al Ĉinio, kaj studas pri la internacia mer-

kato kaj antaŭinvestaj laboroj. Nun ĝi jam aĉetis arbarojn en Norda Ameriko kaj aliaj lokoj kaj komencis arbohakadon. Ĝi faris esploradon ankaŭ pri investita ebleco de altkvalita kupra erco kaj kalia salo. Ĝi faris investon por la Aŭmen-a Cementa Fabriko, la plej granda en Aŭmen.

5. Luigi domojn.


La Internacia Domego konstruita en Pekino per investo de la korporacio mem estas jam transdonita al uzo. Dudekelkajn etaĝojn de la domego oni jam luigis al eksterlandaj entreprenoj en Pekino kiel iliajn oficejojn. Oni jam projektis la kvindek-etaĝan domegon Ĝingĉeng, kiun oni luigos ankaŭ al fremdlandaj entreprenoj kiel iliajn oficejojn. Krome, la korporacio intencas luigi ankaŭ aliajn domojn enlande kaj eksterlande.

6. Aktive disvolvi servojn de ekonomia konsultiĝo en- kaj eksterlande.

En oktobro 1981 establiĝis sub la korporacio la Ĉina Internacia Kompanio de Ekonomia Konsultiĝo por servi al en- kaj eksterlandaj klientoj en ekonomio, ju-

ro, tekniko kaj aliaj flankoj. Post sia fondiĝo ĝi jam subskribis kunlaborajn interkonsentojn kun multaj famaj konsultiĝaj kompanioj de aliaj landoj, akceptis pli ol cent konsultajn laborojn de en- kaj eksterlandaj klientoj kaj samtempe plenumis konsultojn de la korporacio mem. Ĝi jam akiris la konfidon de en- kaj eksterlandaj klientoj. La Monĉa Banko kaj la Ekspluata Programo de la Unuiĝintaj Nacioj akceptis la kompanion kiel oficialan konsultiĝan organizon kaj konservis ĝiajn informojn en komputilmemorilo. Iuj departementoj enlandaj invitis ĝin kiel sian konstantan konsiliston. La kompanio donas al en- kaj eksterlandaj investantoj materialojn kaj informojn pri investaj medioj en Ĉinio kaj redaktas kaj eldonas "Gvidilo por Investo en Ĉinio".

Laŭ la bezono de la ekonomia konstruado de Ĉinio, la korporacio kunlaboros kun pli da eksterlandaj entreprenoj, pliintimigos la kunlaboron kun enlandaj entreprenoj kaj departementoj por fari novajn kontribuojn en utiligo de fremdlandaj kapitaloj kaj importado de avangardaj tekniko kaj ekipaĵoj.



Komputila oficejo de la korporacio

KUNMING, PRINTEMPA URBO SUR ALTEBENAĴO

de CAŬ BAJLONG

Fotoj de LI ĈUNGENG

Vojaĝo al Kunming, Junnan-provinco, Ĉinio, estas agrabla en ĉiuj sezonoj de la jaro. Ĝi, kun ĉarmaj vidaĵoj, situas pli ol 1 800 metrojn super la marnivelo. La klimato estas ne varma en somero nek malvarma en vintro, ne seka nek tro malseka. Ĝia mez-nombra jara temperaturo estas ĉ. 15°C. La diferenco inter somero kaj vintro ne superas dek gradojn. La mez-nombra jara pluvokvanto estas 1017.4 milimetroj. Ĝi estas unu el la plej bonklimataj urboj en Ĉinio, kaj alinomata "printempa urbo".

Ĝi estas ĝardena urbo, kie tutjare prosperas floroj kaj verdas herboj. Oni diras, ke tie floroj konstante ĉarmas unuj post aliaj en la kvar sezonoj. El la floroj la plej fama estas kamelio, kies nombro de florspecioj okupas la unuan lokon en Ĉinio. Jam antaŭ 500 jaroj oni laŭdis, ke "kamelio de Junnan estas la plej bela en Ĉinio".

Tie la vojaĝantoj ofte kun granda intereso rigardas la nacimultanojn. La taj-aj kaj baj-aj knabinoj, kun belaj ornamaĵoj sur kapo kaj en okulplaĉaj kostumoj, jen kaj jen aperas sur strato arope, kio plibeligas la ĝardenan urbon. Junnan estas provinco kun multaj nacimultuloj. El la pli ol 50 nacimultuloj de la tuta lando pli ol 30 vivas en Junnan-provinco kaj Kunming ja estas ilia mon-trofenestro. En grandaj hoteloj

de Kunming, al la vojaĝantoj bone servas ankaŭ kelneroj ride-te en diversaj nacimultaj kostumoj.

"DORMANTA BELULINO" ĈE KUNMING-LAGO

En Kunming troviĝas multaj pitoreskejoj kaj historiaj objektoj. La famkonata Djanĉi-lago (alinomata Kunming-lago) kun areo de ĉ. 300 kvadrataj kilometroj situas 20 kilometrojn sudokcidente de la urbo. Okcidente de la lago estas fama pitoreskejo la Okcidenta Monto, kiu impresas kiel dormanta belulino rigardate de malproksime. Ĝiaj vizaĝo, brusto, abdomeno kaj gamboj klare konturiĝas. Tie cirkulas legendoj pri la belulino kaj la lago. Ori-

gine la belulino estis fiŝistino kaj vivtenis sin per fiŝkaptado kune kun sia edzo. Iun ŝtorman nokton ŝia edzo ne revenis de fiŝkaptado. De tiam ŝi atendadis lin tage kaj nokte, senĉese plorante. Ĝiaj larmoj formis la lagon Djanĉi. Poste ŝi endormiĝis profunde kaj ne plu vekigis. Ŝia korpo transformiĝis en la Okcidentan Monton.

La Drako-Portejo, fama vidindejo kaj taoista templo, pli ol 2 000 metrojn super la marnivelo, sin trovas sur la Okcidenta Monto. Sur la apika krutaĵo situas pavilonoj unu pli alta ol alia. Por atingi ĝian supron oni devas grimpi laŭ zigzagaj tuneloj kun intermitaj ŝtonaj muroj ĉe la

Kunming





La nova hotelo Kunming

ekstera flanko kiuj estas kunligataj per feraj balustradoj. De tie malsupren rigardante la abismon oni tremas de timo. De la pavilono Sanĉing, tra mallarĝa ŝtonvojeteto kun gravuritaj vortoj "Vojo kondukas al alia mondo", grimpite supren laŭ la ŝtonŝtupoj, oni atingas ŝtonajn ĉambrojn kaj ŝtonajn terasojn, kie la vidkampo fariĝas tuj vasta. Pli sude kuŝas kaverno Cijun. En ĝi sidas gravurita sidstatuo de Avalokitesvaro. Tie la kolonoj, kasonoj kaj diversaj ornamaĵoj senescepte estas ĉizitaj sur rokoj. Daŭre supren grimpane laŭ la ŝtupoj de la tunelo, oni venas al la ŝtona portalo kun ĉinaj ideografiaĵoj "Drako-Portego". Tie troviĝas ŝtonĉambro, en kiu estas statuo de la dio Kujŝing kun peniko en la mano kaj legenda ĥelonio sub la piedo. La pordkolonoj, incensuoj, altaro, vazoj kaj naĝantaj drakoj ĉiuj

estas subtile ĉizitaj sur rokoj. Eksterdome estas balkono ĉirkaŭita de ŝtona balustrado. Sube vidiĝas apika klifo kun panorama vido de la lago Djanĉi.

En la nordo de Djanĉi-lago majestas parko Dagŭanloŭ, staranta kontraŭ la Okcidenta Monto. La famkonata Dagŭanloŭ estas ĉirkaŭita de longaj digoj. Sur la kolonoj de ĝia antŭa pordo estis gravurita 180-ideograma versparo verkita de Sun Janŭeng, poeto de la 19-a jarcento. La antaŭa verso sur unu kolono priskribas belan pejzaĝon de Djanĉi-lago kaj la posta sur la alia skizas la historion de la provinco Junnan. Ĝi estas laŭdire la plej longa versparo en Ĉinio.

TEMPLO ĈJONGĜU KAJ 500 ARHAT-STATUOJ

Turistoj, kiuj ŝatas skulpturon, nepre veturu al Ĉjongĝu-templo sur Ju'an-monto je 10 km. nord-okcidente de la urbo Kunming por rigardi la majstroverkon en la antikveco — la argile modlitajn statuojn de 500 arhatoj.

La templo kun tri kortoj estas konstruita laŭ montodeklivo. En la ĉefa halo troviĝas la statuoj de Diplamkara, Ŝakjamunio kaj Majtrejo modlitaj en la 14-a jarcento. Ĉe ĝia angulo vidiĝas edikt-ŝtontabulo starigita en 1316, kiu notis, ke imperiestro de Jŭan-dinastio nomumis la abaton de la templo kaj donis la sutron Dazang por tie konservi, postulate, ke la templon protektu la armeanoj kaj popolanoj. Ambaŭflanke de la halo kaj en la flankaj ĉambroj de alia halo troviĝas 500 argilaj arhatstatuoj modlitaj de la siĉŭan-a popola skulptisto Li Gŭangŝiŭ kaj liaj kvin disĉiploj en la 19-a jarcento. La statuoj estas ĉ. unu metron altaj kaj kolore farbitaj en diversaj pozoj kaj kun vivece malsama karak-

tero kaj humoro. Ili havas fortan vivetoson kaj estas elstaraj popolaj artaĵoj en Ĉinio.

VIZITO AL ŜTONARBARO

La Ŝtonarbaro, ĝenerale dirite, plej allogas la turistojn vojaĝantajn al Kunming.

Nemalmultaj eksterlandanoj opinias, ke la Ŝtonarbaro, samkiel la Granda Muro kaj la argilaj militistoj kaj ĉevaloj elterigitaj ĉe la maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio, estas miraklo en la mondo. La Ŝtonarbaro kun areo de pli ol 20 mil hektaroj formiĝis en paleozoiko kaj estas tipa kalkŝtona formacio. Tie estas gigantaj ŝtonaj pinakloj, kolonoj, stalaktitoj, stalagmitoj, kavoj, subteraj riveroj kaj kavernoj formitaj el kalkŝtono. De malproksime rigardate, la grizaj pinakloj kaj kolonoj ĉielskrapantaj impresas kiel densa arbaro. Tie videblas belaspektaj ŝtonaj kolonoj kaj groteskaj rokoj. Inter ili estas figuroj similaj al tiuj de "patrino kun infano en vojaĝo", "elefanteto", "virleono", "knabino kun korbo surdorse" k.a. En la kavernoj, troviĝas ŝtonaj ĉambroj, litoj, benkoj, iuloke videblas nur strio da ĉielo de malsupre. Inter la kolonoj kaj rokoj murmuris riveretoj, sur kiuj kuŝas naturaj pontetoj. Vere fea lando estas antaŭ ni!


La 24-an de la sesa monato ĉiujare laŭ la ĉina luna kalendaro la lokaj sani-oj celebras sian Torĉan Feston. Tage ili okazigas lukton, grimpadon sur stangon kaj surĉevalan arkopafadon. Nokte ili dancas kaj kantas ĉirkaŭ kampfajroj. Turistoj en la hotelo "Ŝtona Arbaro" povas ĝui dancadon kaj kantadon de sani-oj vespere kaj aĉeti broditajn memoraĵojn de la lokaj nacimalplimultanoj.



Promenejo

En nacimalplimulta restoracio





Cujhu-parko






Ŝtona Arbaro



Turistoj vizitas la Drako-Pordegon.



Arhato-statuoĵoj en la templo Ĉjongĝu




Moskva baletto floras en Pekino

de ĜENG ĜIN kaj OEJ LJAŬ

Fotoj de CAJ HAJFENG



Sceno el "Malbonfaroj de Terpsikora"



Sceno el "Malbonfaroj de Terpsikora"

La naskiĝo de Eva en "Genezo"



Sceno el "Malbonfaroj de Terpsikora"

En la ora aŭtuno de 1985 la Moskva Klasik-baleta Trupo de Sovetio prezentis en Ŝanhajo kaj ricevis varman aplaŭdon de la spektantoj. Post tio ĝi faris sian unuan prezentadon en la Pekina Eksponejo la 18-an de oktobro.

Kun leviĝo de la bela melodio "La Blua Danubo", fama valso de Johann Strauss, malrapide malfermiĝis la kurteno. Antaŭ la spektantoj aperis gebaletistoj klasikaj kaj modernaj, kiuj sin ekzercis sur la scenejo por konkurso. Jen sceno el "Malbonfaroj de Terpsikora", kiu per ĉarmaj baletoj klasika kaj moderna montris internacian konkurson. Sur la scenejo ĝuste kiel sur ludkampo komenciĝis konkurso pri baleta arto, i.a. estis epizodoj de la klasikaj baletoj "Silfida", "Rajmonda" kaj "La Dormanta Belulino" kaj la moderna solo "Mi Memoras Vin, Orlandon", kaj vidiĝis ankaŭ altaj saltoj kaj rapida turniĝado kun elstara ludarto kaj la pensiga "Puŝkin"... Tio estas

bele farita balet-kolekto. La reĝisoro lerte gvidis la spektantojn en la humurajn intrigojn kaj donis al ili ŝancon ĝui diversstilajn baletajn artojn travivintajn pli ol 100 jarojn.


La belaj kaj lertaj dancaĵoj de la sovetiaj artistoj rikoltis foje-refoje varmajn aplaŭdojn de la spektantoj. Precipe en la ludo de fragmento de la baletto "Rajmonda" la popola aktorino de la Rusa Federa Respubliko G. Ŝljapina admirigis la ĉinajn kolegojn per siaj lertaj saltoj kaj ĉarma turniĝado sur unu piedpinto.

Eksonis dancmuziko de "La Dormanta Belulino" komponita de P.I. Ĉajkovskij kaj tuj ektondris manklakado antaŭ la ludo de paro da gebaletistoj. Ili estis Tang Min kaj Ĝang Ŭejĉjang, ĉinaj gedancistoj, premiitaj en la Internacia Baleta Konkurso en Moskvo en 1985. Invitite, ili ludis tiutage kune kun sovetiaj kolegoj.

Post la prezentado, estro de la Moskva Klasik-baleta Trupo kaj ĝia arta prizorganto V. Vasiljev diris: "Niaj ĉinaj kolegoj estas altnivelaj. Ilia ludo kun ni pli-perfektigis nian arton."

Tang Min, ĉina baletistino, opiniis, ke la ludarto de la sovetiaj kolegoj estas altnivela ĝenerale. La kuna ludado sentigis al ŝi premitecon, kio tamen utilis al ŝia arta plialtigo.

V. Vasiljev ludis en 1959 en Ĉinio kune kun mondfama baletistino Ulanova de la Moskva Ŝtata Granda Teatro. Forpasis pli ol 20 jaroj post tio kaj nun lia refoja vizito al Ĉinio tre ĝojigis lin. Li diris: "La aplaŭdado de la ĉinaj rigardantoj estas tute ekster nia atendo. Antaŭ la unuafoja prezentado en Ŝanhajo niaj geaktorj estis timemaj, ĉar ili ŝciis, ke la ĉinaj spektantoj estas rigoraj al la prezentado, sed la aplaŭdado de pli ol 6 000 spektantoj ekscitis ilin. La prezentado en Pekino same ekscitis ilin."



Sovetiaj artistoj sur la Granda Muro

La Moskva Klasik-baleta Trupo fondiĝis en 1966. Ĝi estis destinita por turneoj. La gvidantoj de la trupo N. Kasatkina kaj V. Vasiljev estis famaj aktoroj de la Moskva Ŝtata Granda Teatro kaj ricevintoj de ŝtataj premioj de Sovetio. Ĉi-foje venis en Ĉinion 27 aktoroj. Krom "Malbonfaroj de Terpsikora" ili prezentis ankaŭ duaktan baleton "Genezo", kiu per romantika danco en iluzia medio montris la batalon inter virto kaj malvirto en la mita mondo kaj estigis fortan artan infekton. La trupo ludis en pli ol 30 landoj kaj nemalmultaj el ĝiaj membroj estis premiitaj en internaciaj konkursoj.

Matene de la 22-a de oktobro la sovetiaj gebaletistoj gatis en la Ĉina Baleta Trupo. La geaktoroj de ambaŭ trupoj kune sin ekzercis kaj interŝanĝis spertojn. La

sovetiaj aktoroj per sia lerta arto vekis admiron ĉe la ĉinaj kolegoj. Li Ĉengŝjang, estro de la Ĉina Baleta Trupo, diris: "Ni tre sopiras la veteranajn sovetiajn baletistojn, kiuj elkulturis por Ĉinio ĝiajn unuajn baletistojn, instruistojn kaj reĝisorojn. Iliaj elstaraj meritoj estas notitaj en la historio de la ĉina baleta arto."

Ankaŭ V. Vasiljev kun ĝojo diris: "Ĉinio havas longan kulturen historion. Ĝia popola danco estas originala. La ĉi-foja kultura interŝanĝo estas bona ŝanco por lerni unu de la alia. Ni devas kiel eble plej larĝe malfermi la artan pordon. Ni estas malkaŝemaj. Nia interŝanĝo estas simbolo de amikeco."

Iliaj vortoj kiel baletisto vekis belan melodion de amikeco en la koroj de la aŭskultantoj. La sovetia baleta trupo bone ĝuigis la ĉinajn spektantojn kaj la amikeco inter la artistoj ĉinaj kaj sovetiaj kreskiĝis en la arta interŝanĝo.

Artistoj de Ĉinio kaj Sovetio en trejnado



Fizikkulturo de ĉinaj laboristoj

De la 9-a ĝis la 15-a de septembro, 1985, 1 700 laboristoj-sportistoj partoprenis en la Dua Sportkunveno de Ĉinaj Laboristoj, kiu solene okazis en Pekino. Post la konkurso la Ŝandong-a teamo gajnis 21 orajn medalojn, la pekina teamo 19 kaj la ŝanhaja teamo 16.


La fizikkulturo de laboristoj en la nova Ĉinio disvolviĝas, akompanate de la ekspansio de ilia vicaro. Inter ĉ. cent milionoj da ĉinaj laboristoj 40 milionoj ofte faras korpo-ekzercadon. Ĝi okazas kutime antaŭ kaj post laboro, escepte de grand-skala sportkunveno aŭ oficiala konkurso. Ĝi enhavas ne nur sportbranĉojn, kiaj atletiko, pilko-ludo, naĝado, sketado, ĉina luktarto k.a., sed ankaŭ tiujn faratajn de entreprenoj laŭ ties konkretaj kondiĉoj. Kaj krome, estas popularaj ankaŭ gimnastikaj ekzercoj en muziko, malrapida kuro kaj tradicia profunda spiro kun kurac-efiko.


SPORTKUNVENO SUR PUTOBORA KONSTRUEJO

Daĉing-petrolkampo estas la plej granda petrolproduktejo de Ĉinio, kiu situas en Hejlong-

ĝjang-provinco, la plej norda provinco de Ĉinio. Duono de ĝiaj pli ol cent mil laboristoj faras korpo-ekzercadon. En la lasta julio la putobora taĉmento n-ro 32740, avangarda taĉmento, okazigis la sepan sportkunvenon sur la putobora konstruejo. Ili konkursis pri ludoj de korbopilko, flugpilko kaj tablotenis, stafetkuro, ŝnurtiro, longosalto, alto-salto, lancoĵeto kaj rapidkuro. Ili prenis kiel sportejon la interspacon kun longo de 30 metroj kaj larĝo de 20 metroj apud sia provizora kampadejo. Pro la malvasteco de la sportejo ili devis elekti alian lokon por konkurso de ĵetludoj kaj fari kuradon ĉirkaŭ la kampadejo. Antaŭ la konkurso ili iom ebenigis la tersurfacon ĉirkaŭ la kampadejo kaj markis kurvojn per kalkaĵo. Kvankam la kondiĉoj ne estis favoraj, tamen dum la tuta konkurso regis varma atmosfero. Ĉiuj lancoĵetantoj serioze partoprenis en la konkurso kaj ne tre atentis pri sia memfarita nenorma lanco, kiu flugis iom ŝanceliĝante en aero. La kurvo havis ortajn kurbiĝojn, kie preskaŭ ĉiuj kurantoj perdis ekvilibron pro sia rapida kurado. Ĉe tio la aplaŭdantaj rigardantoj ofte eligis afablan ridon kaj laŭtajn kuraĝigajn vortojn. La lasta

Matenaj gimnastikaj ekzercoj





Ludo de piedvolano

sportobranĉo estis ŝnur-tiro, kies partoprenantaj teamoj ĉiu konsistis el 12 homoj, ĉar ĉiu laborgrupo havas nur 14-15 membrojn, tial preskaŭ ĉiuj laboristoj partoprenis la konkurson. Foje, subite ekpluvis nelonge post la komenco de konkurso. Ĉiuj konkursantoj ne volis interrompi la konkurson. Tiukaze la juĝistoj kaj entuziasmaj rigardantoj devis ilin akompani ĝis la fino.

La putobora taĉmento el 73 laboristoj kaj oficistoj, kun meza aĝo de 23 jaroj, estas dividitaj en kvin laborgrupojn. De multaj jaroj ĝiaj multaj spertaj laboristoj kaj oficistoj estas transpostenigitaj al aliaj putoboraj taĉmentoj kaj novicoj aliĝas al ĝi, sed la tradicio de fizikekzercado estas konservata. Frumatene iuj kuras, aliaj faras gimnastikajn ekzercojn, triaj sin ekzercas per rekado kaj paralelado. Ĉiutage, post vespermanĝo, sur la pilkkampo okazas konkurso, kiu daŭras ĝis kiam oni ne povas distingi vizaĝojn pro mallumiĝo. La putobora taĉmento devas ofte ŝanĝi sian laboran lokon. Ĉiufoje, kiam la taĉmento translokiĝas, oni aranĝas specialan aŭton por transporti sportajn aparatojn kaj ilojn. Kiam ili starigas ŝaktoskafaldon en nova loko, ili tuj elektas en la ĉirkaŭaĵo taŭgajn lokojn kiel korbopilkan kampon kaj sportejon. En la dua aŭ tria tago post ilia alveno al nova loko, la sportoj revigliĝas kiel antaŭe. Res-

Ŝnur-tirado



pondeculo de la taĉmento diris, ke fizikkulturo donis al ili jenajn avantaĝojn: Unue, la laboristoj kaj oficistoj fariĝis pli sanaj kaj povas pli bone plenumi la penigan putoboradon, due, tio riĉigis ilian vivon kaj intimigis iliajn interrilatojn.

APARTA KONKURSO

Interesa konkurso okazis en la forstokulturrejo Hongtuŝan sub la Lingĵang-a Forstokultura Buroo, Ĝjilin-provinco.

Sur la larĝa cementa vojo antaŭ la oficejo de la forstokulturrejo, kvin junuloj startis, apenaŭ aŭdinte pafon de ekkuro. Kurinte 20 metrojn, ili levis de sur la tero motorstartigilon (granda kiel pugno kaj peza je 0.5 kilogramo). Ĉe la loko 30 metrojn for de la finpunkto, sur ĉiu kurvojo estas metita ĉensegilo. Sin ĵetinte al la segilo, ĉiu kuranto fiksas la startigilon sur la motoro kaj forte tiris la ŝnuron por startigi la motoron, je tio ekbruegis la motoro. Tiam la junuloj kun ĉensegiloj sin pafis al la finpunkto. Kvar el ili preskaŭ samtempe atingis la punkton. La alia postiĝis, ĉar lia segilo ekfunkciis post kvarfoja ŝtartigilo. Tiu konkurso nomiĝas "100-metra kuro kun ekfunkciigo de ĉensegilo" kaj ĝi celas plisani laboristojn kaj altigi ilian kapablon funkciigi ĉensegilon. Alia

sportobranĉo estis "100-metra kuro kun meĉbruligo". Dum kurado oni devas bruligi kvin meĉojn dismetitajn en difinitaj distancoj. La sportobranĉo celas altigi la kapablon de meĉbruligo. La meĉbruligo estas ofte uzata en ŝosekonstruado kaj forigo de arboradikoj de forstokulturrejo. Tial ĉiu laboristo devas bruligi meĉon kaj atingi sekuran lokon en kiel eble plej mallonga tempo. Ĉiuj forstokulturrejoj kaj departementoj de la Lingĵang-a Forstokultura Buroo havas tiajn specialajn sportobranĉojn. Ekz., "100-metra kuro kun rapida kalkulo" celas altigi kalkulrapidecon de ekzamenistoj; "100-metra kuro kun najlado de sablokesto" celas lertigi laboristojn en farado kaj transportado de fajroestinga sablokesto okaze de incendio en arbaro; "100-metra kuro kun materialo-elekto" celas altigi la kapablon de materialo-elektistoj en ties rapida kaj ĝusta taksado pri la kvalito de rondlignoj kaj ilia uzebla kvanto kaj "100-metra kuro kun anstataŭigo de rado" de ŝoforoj. La konkursoj kombinantaj korpo-ekzercadon kaj trejnadon en labora lertiĝo estas vaste alprenataj en la forstokultura buroo kaj gravaj sportobranĉoj ekster ordinaraĵoj sportoj. Ili estas tre bonvenaj al laboristoj, kiuj posedas bonan teknikon, kaj la junaj laboristoj, kiuj deziras montri sian talenton en fiziko kaj tekniko.

Vetkuro



ENTUZIASMULOJ DE FIZIKKULTURA AFERO

En la urbo Anŝan, nordorienta Ĉinio, estas laŭdinda trejnisto de postlabora longdistanca kuro, kiu nomiĝas Jang Ĝinghe. Dum la pasintaj pli ol 20 jaroj li funkciis kiel trejnisto kaj estro de la postlabora trupo de longdistanca kuro. Kiam li estis lernanto, li jam ekamis sporton. Nun li aĝas 54 jarojn. Dum dekoj da jaroj li neniam interrompis sian korpo-ekzercon. En 1965 li organizis postlaboran trupon de longdistanca kuro. En tio li akumulis multe da spertoj. Li mem kreis rekordojn de 5 000-metra kaj 10 000-metra kuroj de maljunaj laboristoj de Ĉinio. Li fervore helpas trupanojn en trejnado, precipe junulojn. Dank' al lia helpo, pliparto de la trupanoj progresis en la longdistanca kuro kaj elbakiĝis el ili kelkaj sportaj talentuloj. En la Dua Sportkunveno de Ĉinaj Laboristoj lia trupano Liŭ Dongmei rompis la landan rekordon de virina 3 000-metra kuro.

La pli-ol-50-jara Li Kunĵen estas laŭdita kiel persono dediĉanta sin al fizikkultura afero de laboristoj kaj oficistoj. Li estas fizikkultura respondeculo de la laborista sindikato en Ĉangŝa, Hunan-provinco. Antaŭ 30 jaroj li prenis sur sin la laboron. En la komenco de la 50-aj jaroj, li sola respondecis pri fizikkultura laboro en la sin-

dikato. Li mobilizis ĉ. 50 sportajn aktivulojn de fabrikoj al la fizikkultura laboro. Dank' al lia iniciativo, en la urbo fondiĝis fizikkultura komisiono de laboristoj, kiu konsistas el fakoj de konkurso, trejnado, juĝado kaj servoj. Kaj krome, li ankaŭ starigis fizikkulturajn kursojn kaj elkulturis 6 000 sportajn aktivulojn por diversaj entreprenoj kaj fabrikoj de la urbo.

Plejparton de tempo li dediĉas al fizikkulturo en entreprenoj kaj fabrikoj, tial li estas bone konata de multaj laboristoj. Por pluapaŝe disvolvi fizikkulturon de laboristoj, li persistas en okazigo de korpopilka, tablotenisa kaj volana konkursoj en bazaj laborunuoj. Li opinias, ke tio estas bona rimedo por stimuli laboristojn al fizikkulturo, kvankam tio multe malfaciligas al li la laboron.

Nun, malgraŭ sia maljuniĝo, li pene laboras por realigi sian celon. En 1979, kiam lia nazo multe sangis, kuracisto opiniis, ke eble lin trafis nazkancero. Lia edzino ege maltrankviliĝis, tamen li ŝin konsolis: "Ne estu maltrankvila, ĉar tio ne donas helpon. Homo, kiu vere kontribuis al la popolo, ricevas de tio konsolon." En la pasintjara prepar konkurso de korbopilka ludo por la Dua Sportkunveno de Ĉinaj Laboristoj, li kaj liaj kolegoj faris multajn laborojn kaj per tio garantiis plenan sukceson al la prepar konkurso.

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Al tiu, kiu volas sendi al mi 40 uzitajn poŝtmarkojn de sia lando, mi certe sendos reciproke nederlandajn pm. S-ro H. Hoogland, Keizerstraat 40 code 3135, CV Vlaardingen, Nederlando.

* Mi intencas viziti la Kongreson en Ĉinio kaj serĉas ĉinan korespondanton kiu ankaŭ kongre-

sos. Mi estas sveda pensiulo kaj loĝas en Hispanio. Tage Petersson, Apartado 162, Altea, (Alicante), Hispanio.

* 17-jara lernanto deziras korespondi tm. ĉefe el Usono, Eŭropo kaj Japanio. Sayid Vahid, Pf.612, Tabrin, Iran.

* Arkitekto kaj radiamatoro deziras kontaktiĝi letere pri arkitekturarto kaj radie kun "DX" radioamatora stacio. Apolonio H P. Melo-Py 7 Py, Rua Manoel Bezerra, 125, 50000-Recife-Pe-Brazilo.

* Kemenes Edit, N. Rusu Nr.233/A, Voslobeni, HR, 4202, Rumanio, deziras korespondi kun la tuta mondo pri ĉiuj temoj.

UTILIGU LA PROPAGANDAJN EBLECOJN DE IEMW

La Internacia Esperanto-Muzeo en

Wien-Vieno (IEMW, Aŭstrio) ludas gravan rolon en la informado pri Esperanto: Venas ĉiujare miloj da homoj el la tuta mondo. Grandparte tiuj vizitantoj ne estas esperantistoj, sed simple interesatoj, kiuj iam aŭdis pri Esperanto kaj volas informiĝi. Tial IEMW bezonus nacilingvajn informilojn pri Esperanto, ĝiaj kvalitoj kaj trajtoj, kaj pri la plej diversaj landaj organizoj. La adreso: Internacia Esperanto-Muzeo en Wien, Hofburg, A-1010 Vieno, Aŭstrio.

* 30-jara katolika Monaĥo kaj prof. Lingvistiko, deziras interŝanĝi poŝtkartojn, poŝtmarkojn, bankbiletojn kaj monerojn tutmonde ĉefe kun ĉinoj. Mia adreso: Frato Tadeu Luiz Fernandes OFM, Caixa Postal 90.023, Petropolis 25.600 RJ, Brazilo.

Sporto beligas la homan figuron



Nemalmultaj el miaj iamaj kunlernantinoj grasiĝis en sia mezaĝo. Ili tre ĉagreniĝis, ke graseco ne nur malbeligas ilian figuron, sed ankaŭ malfaciligas ilian iradon, premas ilian koron kaj altigas ilian sangopremon. Graseco minacas ankaŭ junulinojn. La enketo de iu hospitalo de Pekino pri junaj laboristinoj kaj oficistinoj sub la aĝo de 25 jaroj montras, ke ĉiu kvina el ili estas dikulino. Okazas, ke iuj junaj dikulinoj ĉiamaniere reduktas sian manĝon, eĉ ne kuraĝas multe trinki, nek manĝi pli da sukeraĵoj kaj fruktoj. Kun la tempopaso ili ne plu grasiĝas, sed ili aspektas malfortaj kaj malhavas la energion necesan por ili.

Iu profesoro de la fiziologia instituto sub la Pekina Medicina Instituto diris: "Krom la fiziologia kialo ankaŭ la bonaj vivkondiĉoj, asimilo de nutro kaj manko de sporto en la ĉiutaga vivo estas tre gravaj kaŭzoj de grasiĝo."

Kiel malkreskigi la grason kaj teni la ĉarmon de juneco jam fariĝis problemo atentata de multaj virinoj.

ĜOJIGA INFORMO PRI BELIGO DE FIGURO

En 1984 la gimnastika trejnistino Ĉji Jufang fondis belfigurigan kurson en Dongĉeng-distrikto de Pekino, kun la celo malgrasigi dikulojn, grasiĝi maldikulojn, pli-

bonigi la kvaliton de la korpo kaj beligi ilian figuron.

En la lastaj tagoj mi vizitis unu el tiaj kursoj. Je la 18-a horo junulinoj el diversaj fabrikoj, minejoj kaj institucioj duope aŭ triope venis al la ekzercejo por lerni belfigurigan gimnastikon. Antaŭ la komenco de la ekzercado ili libere sin movadis, demetinte la ĵaketon. Mi vidis iun dikan knabinon energie boksi. Ŝajnis al mi, ke ŝi faras nek ekzercojn de *Tajĝiĉjŭan*-gimnastiko, nek profundspirajn ekzercojn, sed iel dancas kaj luktas. Fininte tion post dek minutoj, ŝi ŝvitis kaj anhelis.

"Ĉu la ekzercado bone efikas?" mi demandis.

Iom karesinte la malseketajn harojn, ŝi respondis: "Jes, mia korpopezo reduktiĝis je kvin kilogramoj kaj mi celas malpliigi ĝin ankoraŭ je kvin."

Tiam trejnistino Ĉji Jufang kunvokis la lernantojn per fajfado. Unue ŝi klarigis al ili la ĉefan enhavon de la ekzercado, poste imite al ŝi, ili elstarigis la bruston, retiris la ventron kaj dancis kun manoj svingataj gracie.

Bela muziko akompanis la ekzercadon de la komenco ĝis la fino. La trejnado konsistas el kvar partoj: la unua estas preparo de la ekzercado. En ĝi oni devas movi ĉiujn partojn de la korpo. Laŭ la virinaj trajtoj oni ekzercas ĉefe la bruston, ventron



Pozo de belfiguriga ekzercado



Ĉji Jufang en instruado

kaj postajon por dikigi la brustokarnon, malgrasigi la ventron kaj altigi la postajon.

La dua estas ekzercado de elasteco. Oni ekzercas ĉefe la talion, krurojn kaj brakojn kaj ĉiujn artikojn de la korpo.

La tria estas belfiguriga bokso. Ĝi kombinas modernajn dancaĵojn kaj *Tajĝjiĉjŭan*-gimnastikon por fortigi kaj elastigi muskolojn, pliefikigi la funkcion de la internaj organoj kaj lertigi la artikojn.

La lasta estas ĝenerala ekzercado surbaze de ĉinaj kaj eksterlandaj dancoj, inkluzive de popoldancoj, baletoj kaj modernaj okcidentaj dancoj. Ĝi celas plialtigi la estetikan senton kaj intereson de la ekzercantoj kaj fari iliajn movojn graciaj, elegantaj kaj harmoniaj.

La trejnado daŭras ĉ. du horojn. Ĉiuj kursanoj havas trej-

nan arkivon, en kiu oni registris iliajn mam- kaj talimezurojn, korpopezon, staturon kaj dikecon de ventrograso ĉe la komenco de la kurso, kaj oni refoje ilin ekzamenos, kiam ili finos la kurson, por kontroli la praktikan efikon.

BELFIGURIGA MAJSTRINO

Ĉji Jufang estas iniciatinto de la belfigurigaj kurso kaj gimnastiko. En gimnastinaj vestoj ŝi montriĝis karnodika, facilmovala kaj firma. Estas malfacile imagi, ke ŝi estas jam 45-jara. Iam ŝi estis eminenta sportistino de la Ĉina Gimnastika Teamo kaj gajnis la ĉampionecon de la kunmetita gimnastika konkurso de Ĉinio en 1961. Poste ŝi edziniĝis kaj naskis infanon. Sekve ŝia svelta korpo fariĝis dika, kun pezo de 70 kilogramoj.

Ŝi malĝojiĝis ne nur pro si, sed ankaŭ pro tio, ke multaj junuli-

noj, kvankam ili ŝatas sin beligi, ne bone scias tion fari; iuj mezaĝulinoj fariĝas malfortaj kaj plejparto de la maljunulinoj estas korpulentaj. Ĉji Jufang decidis serĉi belfigurigan vojon por si kaj por aliaj virinoj. Ŝi komen- cis sin ekzerci per kuro, naĝo, montogrimpado kaj gimnastikaj ekzercoj kaj samtempe studis dis- pozicion de la homaj ostoj kaj muskoloj, lernis speciale fiziolo- gion kaj esploris kiel malkreskigi grasojn kaj teni la korpon belas- pekta. Post dek jaroj ŝi rejuniĝis. Ŝi kreis serion da gimnastikaj ek- zercoj por beligi la homan figu- ron. Ŝi preparis fondon de la unua belfiguriga kurso kun 150 lernantoj, sed pli ol 5 000 perso- noj sin anoncis por la kurso, tuj kiam ĵurnalo informis pri la afe- ro.

“Ĉiuj amas sin beligi. Kiu vi- rino ne amas tion?” Ĉji Jufang diris al mi. “Sed al iuj virinoj mankas scioj pri belfiguro, tiel ke ili grasiĝas kun elstara ventro kaj kurba dorso kaj iras kun pied- pintoj eksteren kaj ŝultroj klini- taj. Precipe post nasko multaj virinoj facile grasiĝas, kun gran- diĝanta ventro kaj malleviĝanta postajo.”

La belfiguriga gimnastiko krei- ta de ŝi laŭ virinaj trajtoj kombi- nas dancarton, luktarton kaj gim- nastikon. Ĝi ne nur beligas la fi- guron, sed ankaŭ liberigas la ek- zercantojn de monotoneco. An- taŭ la ekzercado ŝi ofte donas al siaj lernantoj rilatajn sciojn, ekz., tiuj pri nutraĵo kaj grasiĝo, ŝanĝo de kutima malbela pozo kaj kos- metiko, kio estas tre bonvena al virinoj.

En pli ol du jaroj ŝi populari- gis la virinan belfigurigan gim- nastikon en diversaj lokoj de la lando kaj gvidis 40 tiajn kursojn

kun pli ol 2 000 ekzercantoj. Ŝi prelegis pri belfiguro en 13 provincoj kaj urboj, kun pli ol 50 000 aŭskultantoj, kaj krome, ŝi plurfoje demonstris en televidaj programeroj kaj trovis senombrajn rigardantojn. La Eldonejo de Popola Sporto publikigis la libron "Belfigura Gimnastiko de Ĉji Jufang en Bildoj" kaj la Eldonejo de Ĉina Virino aperigis la libron "Belfigura Gimnastiko de Ĉji Jufang". La sukcesoj de ŝiaj kursoj vekis la atenton de multaj virinoj kaj sportistoj. Post tio, oni fondis similajn kursojn en Pekino.

RIMARKINDAJ SUKCESOJ

"Trejnistino Ĉji, mi tre ĝojas, ke mi maldikiĝis je 8.5 kilogramoj kaj fariĝis svelta. Antaŭe, neniu junulo volis ĵeti plian rigar-

don al mi. Sed lastatempe du junuloj skribis al mi amleterojn. Atendu, trejnistino, post nelonge mi invitos vin al mia nupto."

"Jam en la infaneco mi admiris statuon de Venuso. Ŝia korpo estis tiel sana, harmonia kaj perfekta, dum mi tre maldika kaj iris malvigle. Tamen la juneco ne povas resti sen beleco. Kiel forte la beleco sorĉas nin, gejunulojn. Post unumonata ekzercado mi miris, ke mia mezuro pliiĝis je du centimetroj. Mi nepre daŭrigos la ekzercadon."


"Mi, mezaĝa patrino de du infanoj, grasiĝis iom post iom. Ankaŭ por mi, instruistino, belfiguro estas tre grava. Dank' al tia ekzercado mi iras facilpaŝe kaj vigeclplene kun elstara brusto kaj malgrasigita ventro. Antaŭe, je la 21-a horo mi sentis dorme-

mon kaj eĉ ne volis ellitiĝi je la 7-a matene. Sed nun mi povas energioplene labori ĝis profunda nokto."

"Unu monaton post kiam mi partoprenis en la kurso, mia korpo, kiu estis nekredeble grasa, fariĝis malpeza. Artikoj ne plu doloras min, la talio fortiĝis kaj la brusto elstariĝis. Antaŭe mi ofte koleris pro bagatelo, kaj nun mi fariĝis bonhumora kaj grandanima. Mia edzo estas tre kontenta pri tio kaj mia infano diris, ke mi fariĝis bela."

La supraj vortoj estis skribitaj de iuj ekzercantoj. Kun la levigo de la nivelo de la materiala vivo de la ĉina popolo, pli kaj pli multaj virinoj donos atenton al la beleco de sia figuro kaj enviciĝos inter la ekzercantoj de la belfigura gimnastiko.

Ekzercado de la lumbo





Nje Er ludas violonon.

ŬEJ LJAŬ:

Memore al la popolaj muzik

Memore al la 50-a kaj 40-a datrevenoj de la forpaso de la popolaj muzikistoj Nje Er kaj Ŝjan Ŝinghaj respektive, la Kultura Ministerio de Ĉinio kaj Ĉina Muzikista Asocio solene okazigis unu-semajnan memorigan koncerton en Pekino, en kiu oni kvarfoje prezentis kaj per tio sisteme konigis al ĉefurbaj spektantoj la kantaton, operon, solon, simfonion k.a. verkitajn de Nje Er kaj Ŝjan Ŝinghaj. Inter ili la "Unua Simfonio" verkita de Ŝjan printempe de 1941 en Moskvo estis unufoje prezentita.

Nje Er naskiĝis la 15-an de februaro, 1912, en la suda ĉina urbo Kunming. Kvankam li neniam studis en muzikarta lernejo, tamen kiel popola muzikisto havis intiman rilaton kun la popola muziko de sia nacio. Kiam li estis knabeto, lia patrino ofte kantante rakontis al li historiojn per la tono simila al tiu de timpano. La belsona melodio kiel semo profunde enradikiĝis en la koro de la juna Nje. La komponaĵo "Verda Lago en Printempo", verkita de li en Ŝanhajo, estas bazita sur la ĉina popola melodio.

Nje Er kontaktis nemalmultajn ĵurnal-vendajn infanojn en Ŝan-

hajo. Li senlime simpatiis kun ili, vivantaj en la socia fundo. Poste li verkis la vaste popularan kanton "Ĵurnal-vendaj Infanoj".

Frusomere de 1932, Nje Er vojaĝis al Uhan pro publika prezentado. En la profunda nokto de la 11-a de majo, la vaporŝipo atingis Ĝiŭĝjang. Tie aŭskultante la labor-kanton el la riverbordo, li kun emocio notis en sia taglibro: "La amasa kriadado skuas mian animon. Ĝi estas ĝemado kaj muĝado de kuli-oj!" Poste li plurfoje pririgardis la pezan laboron de la dokistoj ĉe la rivero. Ĝuste tio havigis al lia fama ver-

ko "Kanto de Dokistoj" veran simpatian al la popolo.

Nje Er estis fekunda komponisto. En sia 2-jara komponado li verkis pli ol 30 komponaĵojn, esprimantajn la voĉon de la popolo. Kiam li informiĝis, ke al la filmo "Gejunuloj en la Militaj Jaroj" mankas temo-kanto, li do tuj verkis "La Marŝo de Volontuloj", kiu poste estis difinita kiel la nacia himno de la Ĉina Popola Respubliko.

Bedaŭrinde, ke lia vivo estis tre mallonga. La 17-an de julio, 1935, kiam li naĝis ĉe la marbordo Kononuma de la japana urbo Hugizawa, li dronis en la maro en sia aĝo de malpli ol 24 jaroj.

Ŝjan Ŝinghaj naskiĝis en malriĉa fiŝista familio de Ĝuangdong-provinco. Li forte amis muzikon de sia infaneco. En 1928 li ko-

Ŝjan Ŝinghaj (dekstre) kaj karikaturisto Hŭa Ĝjun'u (maldekstre) en la Arta kaj Literatura Instituto Lusin en Jan'an en 1941



istoj Nje Er kaj Ŝjan Ŝinghaj



mencis lerni ludi violonon kaj pianon en la Ŝanhaja Ŝtata Muzika Kolegio. En 1931, li sukcesis trapasi la ekzamenon por eniri en la Parizan Konservatorio. Diplomite en 1935, li revenis al sia patrolando, partoprenis en la kontraŭjapana nacistava muzikaktivado kaj firme decidis servi al la popolo per muziko. Inter 1935 kaj 1938 li verkis pli ol 400 komponaĵojn kontraŭjapanajn kaj nacistavajn, kiaj "Kanto de Partizanoj", "Al la Postfronto de la Malamikoj", "Sur Tajhangmontaro" k. a., kiuj alvokis milojn kaj dekmilojn da gejunuloj al la batalo kontraŭ la japanaj agresantoj kaj por savi la nacion.

Novembre de 1938 Ŝjan Ŝinghaj venis al la revolucia sanktejo Jan'an. Tie li verkis la senmortan kompozicion "Kantato pri la Flava Rivero". Ĝi naskiĝis en la

Kontraŭjapana Rezistmilito, en kiu sangverŝis la ĉina popolo, vivanta en granda mizero. La kantato montris la firman volon de la ĉina nacio, kiu sentime kaj nehaltigeble batalis kontraŭ la agresantoj ĝis la fino por sia liberigo kaj nacistavo. En la koncerto estis ree forte animskua kaj multe kuraĝigaj la lirikeca kaj belsona "Kanto pri la Flava Rivero", "Kanto en Dialogo ĉe la Riverbordo" plena de loka gusto, impona "Defendo de la Flava Rivero", potenca "Kanto al la Flava Rivero", ploriga kaj indigniga "Plendo de la Flava Rivero"

kaj animskua kaj alvokoplena "Muĝu, la Flava Rivero". La "Kantato pri la Flava Rivero" en tiu koncerto atingis grandan sukceson. La kantado ne nur emociis maljunulojn ĝis larmoj, sed ankaŭ rikoltis tondran aplaŭdodon de la junaj spektantoj.

Maje de 1940 Ŝjan Ŝinghaj komencis lerni en Sovetunio. Li malsaniĝis pro longtempa lacego kaj estis sendita al la Kremlo Hospitalo de Moskvo printempe de 1945. Malgraŭ grava malsano li plenumis la orkestran kompozicion "Rapsodio pri Ĉinio" kaj serion de orkestra kompozicio kun la melodio nomo "Manĝjang-hong" k. a. La 30-an de oktobro de la sama jaro li forpasis en la aĝo de 40 jaroj.

Nje Er kaj Ŝjan Ŝinghaj ĝuas altan prestiĝon inter la ĉinaj polanoj. Nun ĉie en nia vasta lando oni rememoras ilin en diversaj manieroj. En Kunming la tombejo de Nje Er estas en plikonstruado. En Kantono la parko Ŝinghaj estas en plikonstruado, tie aperos liaj tombejo, statuo kaj steleo. En Ŝjian, Hongkong kaj aliaj lokoj oni okazigis solenan koncerton memore al tiuj du grandaj muzikistoj.

La Centra Opera Trupo ludas en la koncerto operon verkitan de Ŝjan Ŝinghaj.



ISLAMO EN ĈINIO

de LAN ŠAN

Samkiel budhismo, kristanismo kaj katolikismo, islamo estas enkondukita en Ĉinion de eksterlande. Historia kroniko montras, ke en 651 p.K. venis en Ĉinion araba sendito, kiu konigis al la ĉina imperiestro la fondon de sia lando, ĝiajn sociajn morojn kaj religion. Ĉinaj fakuloj opinias, ke ĝuste en la jaro islamo enkondukiĝis en nian landon.

En la periodo de la dinastioj Tang kaj Song (618 p.K. — 1279 p.K.) multe da arabaj kaj persaj komercistoj atingis nordokcidentan Ĉinion per tervojo kaj Kantonton, Ĉjŭanĝoŭ kaj aliajn lokojn ĉe la sudorienta marbordo de Ĉinio per marvojo. Multaj el ili fiksligiĝis tie kaj edz(in)iĝis al ĉinoj. Iliaj posteuloj estas hodiaŭaj ĉinaj islamanoj.

Komence de la 13-a jc. Ĝingis-Hano faris okcidenten-ekspedicion kaj konskriptigis grandan nombron da islamanoj mez- kaj okcident-aziaj, kiuj poste venis al Ĉinio kune kun la mongola armeo. Tiuj militistoj garnizonis kaj terkulturis ĉie en Ĉinio kaj sekve de tio populariĝis islamo tra nia lando. En Ĵuan-dinastio (1271 p. K. — 1368 p. K.) moskeoj stariĝis en multaj lokoj de Ĉinio kaj iuj islamanoj oficis en ĉinaj registaraj instancoj. La registaroj de Ming-dinastio (1368

p. K. — 1644 p. K.) kaj Ĉing-dinastio (1644 p. K. — 1911 p. K.) praktikis protektan politikon al islamo, tiel ke ĝi disvastiĝis pli vaste.

Enkondukite en Ĉinion, islamo populariĝis ĉe hujoj, ujuguroj, kazaĥoj, tataroj, taĝikoj, ĥalĥa-zoj, uzbekoj, dungŝjangoj, salaoj kaj baŭ'anoj. Kun longtempa disvastiĝo kaj kreskanta nombro de religianoj, preskaŭ ĉiuj anoj el la supre menciitaj naciecoj kredas je islamo. Nun en Ĉinio vivas ĉ. 13 milionoj da islamanoj, kiuj loĝas ĉefe en nordokcidenta Ĉinio, escepte de hujoj, kiuj loĝas preskaŭ en ĉiuj lokoj de nia lando.

Post la naskiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949, la ĉinaj islamanoj, samkiel la aliaj religianoj, ekhavis la rajton pri libereco de religia kredo sub la aŭspicioj de la konstitucio. En la komenco de 1952 famaj islamanoj iniciatis la Ĉinan Islaman Asocion. En majo de la sekvanta jaro okazis en Pekino la Unua Ĉina Islama Kongreso, en kiu oficiale fondiĝis la Ĉina Islama Asocio, la land-skala organizo de la ĉinaj islamanoj. Ĝia celo estas "kunlabori kun la popola registaro en ĝia efektivigo de la politiko pri libereco de religia kredo, disvolvi la bonajn tradiciojn de islamo, ami



Gŭangta, unu el la plej malnovaj moskeoj de Ĉinio

la patrolandon kaj defendi la mondpacon".

La Ĉina Islama Asocio okazigis tutlandajn kongresojn en 1953, 1956, 1963 kaj 1980. Burhan Shahidi funkciis kiel prezidanto de la unuaj tri kongresoj kaj honora prezidanto de la 4-a. Ĝang Ĝje estas prezidanto de la 4-a kongreso. Gvidate de la Ĉina Islama Asocio, establiĝis lokaj islamaj asocioj en multaj provincoj, urboj kaj aŭtonomaj regionoj. Pere de enketado, akcepto de islamaj vizitantoj kaj traktado de leteroj, ili aktive prezentas al la registaro la dezirojn kaj proponojn de la vastaj islamaj amasoj kaj kunlaboras kun ĝi en solvado de religiaj problemoj, tiel ke la islamanoj ĝuas plenan rajton pri libereco de religia kredo.

Aprile de 1955 la asocio fondis la Ĉinan Islaman Instituton — la superan lernejon de la ĉina islamo, kiu estas destinita por kulturaj junajn predikistojn kaj islamajn esplorantojn. La asocio eldonis

la revuon «Ĉinaj Islamanoj» ekde 1957 por fari islaman esplorado kaj interkonatigi aktivadon de diverslokaj islamanoj. Por fari studon pri la islama doktrino kaj historio, kontentigi la bezonon de la islamanoj en koran-recitado, la asocio kolektis kaj ordigis grandan nombron da materialoj pri Korano, presis la verkojn «Korano», «Citaĵoj el Hadith», «Khutbah» en la araba lingvo kaj «Konciza Korano kun Notoj» en la araba-ĉina eldono, redaktis la albumojn «La Vivo de la Ĉinaj Islamanoj», «La Ĉinaj Islamanoj Marŝas Antaŭen» kaj «Religia Vivo de la Ĉinaj Islamanoj» en la ĉina-araba-angla eldono kaj partoprenis en verkado de artikoloj pri islamo por «Granda Ĉina Vortaro» kaj «Plena Ĉina Enciklopedio (religio)».

Ekde 1955 la Ĉina Islama Asocio dekkelk-foje organizis vizitgrupon por pilgrimi al Mekko kaj viziti la maŭzoleon de Mahometo en Medino. Ĉina islama amikeca vizitgrupo plurfoje vizitis islamajn landojn aziajn kaj afrikajn. En la internaciaj islamaj konfe-

rencoj aŭdiĝis la voĉo de delegitoj de la ĉinaj islamanoj. Ankaŭ islamaj vizitgrupoj kaj famaj islamanoj de pluraj islamaj landoj invitive vizitis Ĉinion. Ĉio ĉi akcelis la interkompreniĝon de la islamanoj ĉinaj kaj alilandaj kaj faciligis al la ĉinaj islamanoj konatiĝi kun alilandaj amikoj.

La Ŝinĝjang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono kaj Ningŝja-a Hujnacieca Aŭtonoma Regiono naskiĝis en 1955 kaj 1958 respektive. Post tio, en 10 nacimallimultaj regionoj dense loĝataj de ĉinaj islamanoj unu post alia realiĝis la aŭtonomeco subprovinca kaj gubernia. En diversnivelaj popolaj kongresoj, politikaj interkonsiliĝaj konferencoj kaj popolaj registaroj troviĝas islamaj reprezentantoj aŭ oficistoj.

La ĉina registaro kaj diversnaciecaj popoloj tre respektas kutimojn kaj morojn de la islamanoj en manĝado, religiaj festoj kaj funebrado kaj sepultado. Ĉie, kie vivas islamanoj en Ĉinio, funkcias manĝajaj vendotabloj kaj restoracioj aparte por ili. En

la lokoj, dense loĝataj de islamanoj, oni favore liveras al ili bovaĵon, ŝafaĵon kaj aliajn manĝaĵojn. La islamaj oficistoj kaj laboristoj en registaraj oficejoj aŭ fabrikoj ĉiumonate ricevas subvencion por manĝaĵoj.

La islamanoj iras al moskeoj en la gravaj festoj kaj diservaj tagoj. En Ĉinio plejparto de la moskeoj estas templo-stilaj, kaj en Ŝinĝjang kaj iuj aliaj lokoj troviĝas ankaŭ arab-stilaj moskeoj. Tiuj moskeoj havas longan historion kaj estas difinitaj kiel historiaj konstruaĵoj protektataj de diversnivelaj aŭtoritatoj. Inter ili estas Gŭangta-moskeo en Kantono kaj Ĉingĝing-moskeo en Ĉjŭanĝoŭ, konstruigitaj de persaj komercistoj en la dinastioj Tang kaj Soŭng. Niŭĝje-moskeo en Pekino, konstruita en 996, estas unu el la kvin famaj moskeoj en Ĉinio. Krome, estas famaj ankaŭ la Feniksa Moskeo en Hangĝoŭ, Diserva Moskeo en Jangĝoŭ, moskeo Hŭaĝjŭe en Ŝjian, Granda Ajdikar-moskeo en Kaŝi, Ŝinĝjang, kaj Granda Orienta Moskeo en Jinĉŭan, Ningŝja.



Diservo de islamanoj

NACIMALPLIMULTOJ EN TIBETO

de SUN MINGĜEN

La loĝantoj de la Tibeta Aŭtonoma Regiono plejparte estas tibetanoj, krome tie vivas ankaŭ loĝantoj el pli ol 20 naciecoj, kiaj han-oj, huj-oj, nu-oj, naŝi-oj, menba-oj, lŭoba-oj, ten-oj kaj ŝjarba-oj. La loĝantoj de la naciecoj han-a, huj-a, nu-a kaj naŝi-a transloĝiĝis de najbaraj lokoj en Tibeton en la lastaj jarcentoj. La menba-oj, lŭoba-oj, ten-oj kaj ŝjarba-oj estas indiĝenoj sur la Tibeta Altebenaĵo kiel la tibetanoj.

Ili havas siajn proprajn parollingvojn, morojn kaj kutimojn. Sed mankas al ili skriba lingvo. Pri ilia nacieca origino tie cirkulas belaj legendoj, kiuj diras, ke en la primitiva tempo iliaj prapatroj havis fratan aŭ parencon rilaton kun la naciecoj tibeta kaj han-a. Legendo diras: Antaŭ tre longa tempo iu dio edziĝis al simiino, kiu poste naskis tri filojn. La filoj post plenkreskiĝo iris al malsamaj lokoj. La unua filo estis fortika. Li iris tre malproksimen kaj atingis la marbordan ebenaĵon. Li produktis grenon kaj tie fiksloĝiĝis. Lia idaro formis han-naciecon. La dua filo iris al stepo abunda je akvo kaj herboj kaj tie ekbredis gregojn da bovoj kaj ŝafoj. Lia idaro formis tibetan naciecon. Kaj la tria filo ŝatis arbaron en montaro, prenis ĝin kiel sian hejmon kaj sin vivtenis per ĉasado kaj kolekto de fruktoj. Lia idaro iom

post iom formis aliajn nacimalplimultojn.

La menba-oj, lŭoba-oj, ten-oj kaj ŝjarba-oj vivas ĉe Himalajo en la suda parto de Tibeto. Tie la klimato estas milda, pluvo abunda, arboj kaj herboj prosperaj kaj pejzaĝoj belaj, kio formis favorajn naturajn kondiĉojn. Tamen pro ĝia malproksima situo de la landinterno, altaj montoj, profundaj ravinoj, danĝeraj riveroj kaj senlimaj arbaroj, la tiea trafiko estis tre malfacila antaŭ la Liberiĝo. La geografia medio malhelpis ilin kontaktiĝi kun avangardaj naciecoj, ke ili longtempe vivis izolate de aliaj lokoj. Tio malhelpis ilian disvolviĝon en ekonomio kaj kulturo. Kaj plie, la antaŭaj tibetaj regantoj praktikis diskriminacion kaj subpremadon kontraŭ ili kaj rigardis ilin kiel "sovaĝajn homojn". Tio faris ilin pli postiĝintaj. Ĝis la paca liberiĝo de Tibeto en 1951, ili ankoraŭ vivis en primitiva stato de terkulturado, kolekto kaj ĉasado. En nemalmultaj lokoj vidiĝis spuroj de primitiva komunuma sistemo. Tiam multaj loĝis en budoj el baŝoj folioj kaj arbobranĉoj kaj portis ĉifonajn vestojn el bestaj feloj. Ili suferis malsaton, froston kaj malsanojn, tial ilia loĝantaro kreskis malrapide.

Post la liberiĝo de Tibeto granda ŝanĝiĝo okazis al ilia produktado kaj vivo. En la lokoj,

kie ili vivis siatempe, aperis loĝkvartaloj, ŝoseoj, vojoj kaj pontoj unu post alia. Tiuj, kiuj antaŭe loĝis en kavernoj aŭ budoj, enloĝiĝis en novaj domoj, surhavis novajn vestojn kaj bone meblis sian loĝejon. La ŝtato helpis ilin en agrokulturo, brutobredado, forstokulturo, flankokupoj kaj komerco, kaj tio ebligis al ili multe altigi sian enspezon. La ŝtato asignis monsumon por konstrui por ili lernejojn kaj hospitalojn. Ili senescepte ricevis senpagan kuracon. La ŝtato pagis por lernado, manĝado kaj loĝado de la lernantoj. Ilia vivnivelo nun jam atingis tiun de la tibetanoj. La ŝjarba-oj loĝantaj ĉe Ĝangmu, kiu limtuŝas Nepalon, jam enviĝis inter la plej riĉaj loĝantoj de Tibeto. Antaŭ pli ol 30 jaroj ili kulturis teron en primitiva maniero, sed nun uzas traktorojn, draŝmaŝinojn kaj ventummaŝinojn; nemalmultaj lokoj estas provizitaj per elektro kaj multaj familioj havas radioaparatojn kaj magnetofonojn.

En politiko ili estas egalrajtaj al la aliaj naciecoj. En la tutlanda popola kongreso de Ĉinio kaj tiu de la regiono estas iliaj reprezentantoj. En la popola registaro de la aŭtonoma regiono kaj tiuj de la gubernioj, kie ili loĝas, troviĝas iliaj propraj kadroj. En 1984 fondiĝis 7 naciecaj subdistriktoj en la lokoj, kie ili loĝas. Nun efektiviĝas la celo, ke iliaj

propraj kadroj praktikas administradon de iliaj propraj aferoj.

La menba-oj, lŭoba-oj, ten-oj kaj ŝjarba-oj vivas en preskaŭ sama natura medio kaj havas preskaŭ saman historion de disvolviĝo, sed ili ankoraŭ konservas ĉiu siajn proprajn lingvon, moron kaj kutimon.

La menba-oj vivas ĉefe en la gubernioj Medo, Cona, Njingĉi kaj la subregiono Menju en la sudorienta parto de Tibeto. Ili sin okupas ĉefe pri agrokulturo kaj samtempe pri forstokulturo, brutobredado kaj ĉasado. Ili flankokupoj estas plektado de bambuaj kaj lianaj objektoj, kaldronfarado kaj prilaborado de tinkturo.

La menba-oj parolas la menban lingvon de la tibeta-birma lingva branĉo de la han-tibeta lingva familio kaj havas komplikajn dialektojn. Sed ili plejparte konas la tibetan lingvon kaj aplikas tibetajn skribolingvon kaj kalendaron.

La menba-oj havas siajn naciecajn vestojn kaj morojn, iom diferencajn en malsamaj lokoj. La normalaj menba-aj vestoj estas jenaj: Cu viroj ĉu virinoj ĉiu portas ruĝan robon el kruda lanŝtofo kaj W-forma karmezinan ĉapon kun oranĝa rando. Virinoj portas blankan antaŭtukon ĉe la talio, en festo braceletojn, kolĉenon kaj orelingojn. La knaboj kaj maljunuloj surdorse portas bovidan felon kaj broditajn botojn. La menba-oj en Medogubernio vestas sin simile al tibetanoj.

Ili prenas kiel ĉefajn manĝaĵojn fagopiron, milion, maizon, rizon, farunon el bakitaj hordeo kaj faboj, laktaĵon, hordean alkoholaĵon, buterteon kaj kapsikon. Ili plej ŝatas fagopiran kukon bakitan sur maldika ŝtonplato.



Pikniko de ten-oj dum ĉasado

Foto de MA ĜINGĈIŬ

Ili loĝas en 2-3-etaĝaj dometoj kun ŝtonaj muroj kaj renverse V-forma tegmento ligna aŭ bambua, aŭ domoj konstruitaj tute el bambuo kaj ligno. En la unua etaĝo vivas brutoj kaj en la supraj etaĝoj homoj. Menba-oj dormas,

portante vestojn, sur kruda felto aŭ felo sternita sur la planko.

La menba-oj praktikas monogamion, sed kun koloro de profitavida geedziĝo. Antaŭ geedziĝo la fianĉo devas donaci trifoje al la familio de sia fianĉino alkoholo-



Ŝjarba-a instruistino kaj ŝiaj gelernantoj

Foto de ĜAŜJI

laĵon, viandon, monon kaj aliajn objektojn.

La menba-oj traktas la kadavron per akva, entombiga, kremacia aŭ ĉiela sepulto.

La menba-oj kredas je lamaismo kaj havas intiman religian rilaton kun tibetanoj. Cangjang Ĝjacuo (1683-1706), Dalaj-lamao la Sesa, estis menba-o naskita en Menju-subregiono. Li estis unu el la du estroj de la flava sekto (la plej granda sekto de lamaismo) de la tiama Tibeto kaj fama poeto en la tibeta historio. La madrigaloj verkita de li grave influis sur la tibeta poezio kaj ĝis nun ankoraŭ estas legataj de menba-oj kaj tibetanoj.

La lŭoba-oj loĝas en Lhoju-subregiono en la sudorienta parto de Tibeto kaj en la gubernioj Minling kaj Zaju. Ili parolas la

lŭoba-an lingvon, sin okupas ĉefe pri agrikulturo kaj ĉasado kaj estas lertaj en arkpafado kaj plektado de bambuaj objektoj. La de ili delikate plektitaj kribriroj, dorsaj korboj, matoj, kaĝoj, korboj estas populare uzataj de ili kaj ankaŭ vendataj en lokoj loĝataj de tibetanoj. Ili kutimas al kolektiva ĉasado. Ofte okazas, ke ĉiuj viroj de vilaĝo kune ĉasas. Por la akiritaj ĉasaĵoj, ĉu multe ĉu malmulte, ĉiu vilaĝano egale ricevas sian porcion laŭ la antikva moro. Nur la felo kaj kapo apartenas al la unua trafanto. Kiu havas pli multajn felojn, tiu estas heroo respektata de la loĝantoj.

Kiam la ĉasistoj revenas al la vilaĝo kun siaj ĉasaĵoj, ĉiuj vilaĝanoj devas eliri ilin bonvenigi. Se oni ĉasis grandajn bestojn, la bonveniga ceremonio estas pli

solena kaj oni prezentas al la unua trafanto hordean alkoholaĵon kaj manĝaĵon.

La lŭoba-oj havas abundajn manĝaĵojn, kiaj hordeo, tritiko, milio, maizo, fagopiro, sorgo, legumenacoj; hordea kaj maiza alkoholaĵoj, buterteo, seka viando, bakita viando, brasiko, terpomo, kapsiko kaj bambuidoj.

La lŭoba-oj estas gastamaj, precipe al malproksimaj gastoj. Ili regas gastojn per bakita viando, seka viando, laktaĵo, maiza alkoholaĵo, fagopira kuko kaj kapsiko. La gastiganto unue mem trinkas iom da alkoholaĵo kaj prenas manĝaĵon por montri, ke tiuj estas senvenenaj, kaj poste petas la gastojn al manĝado. La gastigantoj ĝojas, se la gastoj formanĝas ĉiujn manĝaĵojn. Kiam la gastoj renkontas ĉasistojn revenintajn de ĉasado, ankaŭ ili povas ricevi sian porcion kiel la lokaj vilaĝanoj.

La vestaĵoj de lŭoba-oj estas simplaj. La viroj portas veŝton longan ĝis ventro, sovaĝbovan felon sur la dorso. Ronda ĉapo el urso felo, aŭ plektita el bambuo aŭ liano estas emblemo de la viraj lŭoba-oj. Ili ofte kunportas kun si arkon, sagon kaj longan glavon. La virinoj portas bluzon kun ronda kolumo kaj mallarĝaj manikoj kaj lanŝtofana ĵupon. Ĉu viroj ĉu virinoj ĉu havas harfranĝon. Ili ŝatas porti diversajn ornamaĵojn: Viroj portas orelingojn el bambuaj tuboj kaj kolĉenon. Virinoj sin ornamas per dekelkaj eĉ kelkdek bid-rozarioj, braceletoj, orelingoj, arĝentaj moneroj, kupraj tintiloj, ferĉeno, tranĉilo kaj konkoj, kiuj pezas pli ol kvin kg. entute kaj tintas dum irado.

La domoj de lŭoba-oj kun tera kaj ligna strukturo ofte havas lignan plankon.

Ili praktikas monogamion, sed kun koloro de primitiva komuna geedziĝo. Antaŭ la geedziĝo gejunuloj loĝas en komunaj domoj respektive kaj povas libere elekti siajn fianĉ(in)ojn. Por geedziĝo la fianĉo devas donaci al la familio de sia fianĉino 3-10 bovojn.

La lŭoba-oj sepultas la mortinton per entombigo. Parencoj unue vestas la mortinton per puraj vestoj, sidigas la kadavron, kovras ĝin per littuko, ŝnuras kaj metas ĝin dekstre malantaŭ la pordo por 2-3 tagoj, antaŭ ol dorsporti la kadavron al la tombejo. Tiam ili malligas ĝin, rektigas kaj metas ĝin en la tomban kavon, kovras la kavon per pordklapo kaj poste per tero.

La lŭoba-oj kredas ne je dio, sed je diablo, nome natura fetiĉismo. Ili opinias, ke ĉio en la universo havas spiriton kaj ĉio ajn estas gvidata de diablo. Tial ili buĉas kokojn por fari aŭguron kaj kultu diablajn je geedziĝo, funebro, domkonstruo, semado, vojaĝo ktp.

La ten-oj loĝas ĉefe en Zajugubernio de la plej sudorienta parto de Tibeto. Tie estas milda klimato kaj abundaj produktaĵoj.

Ili parolas la ten-an lingvon kun du ĉefaj dialektoj Daĵang kaj Geman, kies parolantoj nomas sin daĵangoj aŭ gemanaj respektive. Tio montris, ke ili eble formiĝis el du grandaj triboj en la ten-a historio. Ili havas familiajn nomojn kaj estas malpermesate geedziĝi inter gejunuloj kun sama familia nomo, kiuj tamen povas geedziĝi post 3-4 generacioj.

Ili sin okupas ĉefe pri terkulturo. La plantoj estas maizo, milio, rizo, sorgo, legumenacoj, kapsiko, ajlo, kolokasio, rafano kaj aliaj. Ĉasado estas ilia ĉefa kromokupo por akiri viandon. Krome, ili ankaŭ iras al arbaro

por kolekti fruktojn kaj drogojn. La virinoj scipovas ŝpini kaj teksu.

Ili manĝas ĉefe maizon, rizon, milion kaj hordean alkoholaĵon. Iliaj kuiriloj kaj manĝiloj plejparte estas kupraj kaj bambuaj. Ili boligas akvon en bambua tubo kaj uzas bambuan pelvon dum manĝado. Ili ĉu viroj ĉu virinoj kunportas longan pipon kaj fumas senĉese ĉu sidante ĉu irante.

La tipaj vestaĵoj de ten-oj estas jenaj: Viroj portas senmanikan kitelon kaj tre mallongan pantalonon dum virinoj portas bluzon kun mallongaj manikoj kaj jupon. Geviroj portas skar-

pon 2-3 metrojn longan kaj unu metron larĝan kaj originalan tornistran. Nur malmultaj viroj portas ornamaĵon, sed virinoj surfrunte portas arĝentan lame non kun manplata grandeco kaj grandajn orelingojn.

La ten-oj loĝas en longaj lignaj domoj kun malaltaj balustradoj, fenestretoj aŭ tute sen fenestroj kaj kun planko subtenata de lignaj pli-ol-unu-metraĵ fosto super la tero. Ĝenerale ĉiu familio posedas po unu tian domon dividitan en kelkajn ĉambrojn per lignaj tabuloj.

Ili praktikas monogamion sub patriarko kaj ankaŭ poligamion, kiu estis tamen malofte vidata en

Ngapoi Ngawang Jigmi (dekstre), vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio, vizitas loĝanton en lŭoba-a vilaĝo.

Foto de ĜAGUOLŬO



la lastaj jaroj. Tia geedziĝo havas profitavidan karakteron. Por preni edzinon oni devas doni al la familio de sia fianĉino konsiderinde grandan nombron da brutoj, mono aŭ aliaj objektoj. La edzino estas propra posedaĵo de la edzo. Se li ne volas kunvivi kun ŝi, li povas ŝin vendi. Post la morto de la edzo, tiu "posedaĵo" povas esti heredata de lia frato aŭ lia proksima parenco. Ankaŭ la edziniĝinta virino konfesas, ke ŝi estas aĉetita.

La ten-oj praktikas kremacion. La kadavro devas esti metita en apartan lokon ĉirkaŭitan de palisaro por 1-3 tagoj. Liaj familioanoj ploras tie tutan nokton, bruligas krakfajraĵojn aŭ faras pafadon por elveki la mortintan animon, antaŭ ol porti la kadavron al kremaciejo.

Kiel la lŭoba-oj, ankaŭ ili kredas je diablo.

Ŝjarba-oj loĝas en Ĝangmu, en la sudokcidenta parto de Tibeto kaj Ĉentang-subdistrikto de Dingĝje-gubernio. Ili parolas la ŝjarba-an lingvon, plejparte povas

paroli la tibetan lingvon kaj ĝenerale uzas la tibetan skriban lingvon. Ili ankoraŭ konservas kastan sistemon.

Ili okupiĝas ĉefe pri agrokulturo, brutobredo kaj forstokulturo. En la lastaj jaroj pli kaj pli multaj ŝjarba-oj sin okupas pri negoco, utiligante la politikon malfermi la pordon al aliaj landoj, kaj riĉiĝis iom post iom. La jara pokapa meznombra enspezo superis mil jŭanojn (ĉ. 3 jŭanoj egalas unu usonan dolaron), pli-ol-trioble multe ol tiu en Tibeto. Ĉ. kvinono de la familioj enspezis 10 000 jŭanojn en unu jaro.

La ŝjarba-oj mangŝas ĉefe maizojn, trinkas buterteon, maizan kaj hordean alkoholaĵojn. En la festoj ĉiu familio preparas fritajojn.

Ili estas tre puremaj. Viroj kaj virinoj ĉiu portas blankan bluzon. La viroj portas blankan kaj mallarĝan pantalonon kaj kunportas kurban sabron. La virinoj portas larĝkruruman pantalonon kun jupo ekstere. La virinoj ofte portas valorajn orajn orelringojn


kaj braceletojn. Ŝjarba-oj loĝas en duetaĝa domo kun ligna planko kaj ĉambroj bonordaj kaj puraj.

La ŝjarba-oj kutimas edziĝi per raba rimedo, precipe kiam la manpetanto estas rifuzita, li do alprenas raban rimedon. Eĉ se la knabino kaj ŝiaj gepatroj konsentas la edziniĝon, oni ankaŭ prenas raban rimedon por plenumi la geedziĝon. Ili loĝas ĉe kru-taj montoj, tial estas malfacile rajdi aŭ uzi palankenon kaj oni devas surdorse porti la rabitan knabinon hejmen. Rabinte la knabinon, oni faras gajan nupton.

Ŝjarba-oj praktikas ankaŭ kremacion. Ili unue metas kadavron en lignan keston, portas ĝin al kremaciejo kaj ĵetas parton de la cindro en riveron.


Ili kredas je lamaismo kaj havas du malgrandajn templojn. La lamaoj estas permesate edziĝi kaj ĝenerale ne loĝi en templo. Ili iras al la temploj nur en religiaj festoj por fari religian aktivadon. La lamaisma influo sur la ŝjarba-ojn estas multe malpli granda ol tiu sur la tibetanojn.

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO




1. Pekino
2. Hajnan-insulo
3. Kunming
4. Heze
5. Tibeta Aŭtonoma Regiono
6. Ĝjangŝji-provinco
7. Fuĝjan-provinco
8. Ĉengdu
9. Daĉing
10. Linĝjang
11. Ĝuangdong-provinco


TIBETO HIERAŮ KAJ HODIAŮ (14)



Danco de ŝjarba-oj Foto de **JAN ĜIN**

Lŭoba-a familio ĉe forno Foto de **TUDENG**






Menba-oj plektas ponton el rotangoj.

Foto de **TUDENG**



Lüoba-a majjunulo en plektado

Foto de **TUDENG**



Ŝjarba-oj en paŝtejo

Foto de **MA ĜINGCIŬ**

Menba-aj virinoj prezentas vinon al siaj parencoj antaŭ ilia vojaĝo.

Foto de **LIŬ HONGŜJAŬ**




JUNA PENTRISTO EL KAMPARO

de ÜEJ LJAÜ



Nur peonioj povas prezenti la ĉarmon de la lando.

"Junaj Bambuoj Verdiĝas en Frosto" (Cinstila pentraĵo)



En la komenco de 1984 iu maldika junulo timeme venis al la belarta sekcio de nia redakcio. Li malvolvis pli ol 30 ĉinstilajn pentraĵojn. Sur ili estas bambuoj kun rektaj trunkoj kaj freŝaj folioj, agloj flugantaj en la ĉielo, ruĝaj floroj kun verdaj folioj, kuriozaj montoj kaj akvoj. . . Tiuj ĉinstilaj pentraĵoj terelspiraj kaj animitaj profunde impresis tri belartajn redaktorojn.

Li venis kontribui al nia revuo. Rezulte, oni restigis lin kaj liajn pentraĵojn. Nun li laboras en nia redakcio kiel oficiala belarta redaktoro.

Li naskiĝis en kamparana familio en Heze-gubernio, Ŝandong-provinco. En sia 8-jara aĝo li ekamis pentradon. Li gravuris sovaĝajn florojn per falĉileto kaj pentris la leviĝantan sunon per viptenilo surtere. Lia unua instruisto estis la patrino. Ŝi, sidante sur terlito, lerte eltondis unu post alia vivoverajn birdetojn kaj florojn kaj teksis koloran tolon. Belo senĉese tiklis lian junan koron.

Heze-gubernio estas malriĉa loko. Ĝi tamen havas mil-hektaran peonian ĝardenon, kiun vizitas nemalmultaj famaj pentristoj el diversaj lokoj por fari skizon. Por rigardi pentradon li forgesis manĝi kaj trinki eĉ tuttage kaj dum horoj fiksas siajn okulojn sur la lertaj manoj de pentristoj por pririgardi tuĉadon, desegnadon kaj nuancadon.

Tage iu pentristo trovis la knabon, kiu lin ĉiam sekvis, kaj interesiĝis pri li, demandante: "Ĉu vi volas lerni pentradon? Mi instruu vin." Tiel la pentristo fariĝis lia dua instruisto.

De tiam li des pli profunde absorbiĝis en lernado de pentrado. Foje, reveninte de la peonia



U Dongkuj en pentrado

ĝardeno, li preparis manĝon, pentrante. Kiam la gepatroj eniris la ĉambron de kamplaboro, ili tuj flaris karbiĝan odoron. Ho ve, la maizkaĉo kuirata surforne jam karbiĝis. Vidinte tion, la patro eksplodis de kolero, forprenis la pentraĵon kaj ĝin ĵetis en la fornon.

Tiam la filo ploris.

En 1974, kiam li laboris en la Metiartaĵa Belarta Fabriko de Heze-gubernio diplomite el supera mezlernejo, li ekhavis kvietan medion por pentrado.

La kondiĉoj de la fabriko estis malfavoraj, sed li energie lernis kaj laboris. Vintre liaj manoj vundiĝis de frosto, somere li ĉirkaŭvolvis sin per malnovaj ĵurnaloj por gardi sin kontraŭ atako de moskitoj. Li vivis modestan vivon, ne postulante manĝaĵon bongustan kaj vestaĵon modan. La pentraĵoj sur ovŝeloj faritaj de li por la fabriko tamen estis pli okulplaĉaj ol tiuj de liaj kolegoj.

En la aŭtuno de 1976 okazis grava ŝanĝiĝo al la fabriko: la fabriko intencis redukti la nom-

bron de laboristoj pro depresia vendado de la produktaĵoj. Informiĝinte pri tio, li pentris belulinojn duflanke sur pli ol 150 ovŝeloj, maldormante tri sinsekvajn noktojn. Tiuj ovŝeloj kaj aliaj novaj specimenoj de tiaj ovŝeloj faritaj de liaj kolegoj baldaŭ komencis produktiĝi pograndede post sankcio. Dank' al tio la fabriko saviĝis el depresio.

Kun la pliboniĝo de la produktado en la fabriko, lia enspezo plimultiĝis iom post iom. Tiam li volis ĉesi esti ordinara pentrolaboristo, kaj li ekhavis pli altan ambicion fariĝi pentristo. De tiam li komencis strebi kun pli granda energio al la vera esenco de pentrarto.

En 1978 li decideme forlasis sian komfortan vivon kaj trapasis


la eniran ekzamenon de la fako pri ĉinstila pentrarto de la Malpez-industria Belarta Lernejo de Ŝandong-provinco. Nun li, kiel fiŝo en akvo, libere naĝis en arta maro. Li kaj studis pri pentrarta teorio kaj lernis verkojn de famaj antikvaj kaj nuntempaj ĉinaj pentristoj. Li persistis en la principo lerni de antikvuloj senblinde imiti iliajn verkojn, lerni de nuntempuloj sen kopii iliajn pentraĵojn, sed ĉerpi iliajn fortaĵojn kaj krei sian propran stilon.

Arto fariĝis lia spirita apogilo kaj donis al li senliman energion. Liaj kunlernantoj loĝantaj kun li en sama dormoĉambro eĉ ne sciis, kiam li enlitiĝis kaj ellitiĝis.

Iun noktomezon lia kunlernanto eta Li, ne povante sin deteni de scivolemo, elŝteliĝis el la dormoĉambro.

En la malluma nokto vidiĝis nur lumo el la klasĉambro. Tra la fenestro eta Li vidis, ke li kaŭrante trempas la plumon en akvo de vazeto kaj pentras sur la planko strekon post streko. Ha, li ekzercis sin en pentrado, prenante la teron kiel paperon kaj akvon kiel inkon. Li difinis al si la taskon, ke li ne dormos, antaŭ ol foruzi en pentrado tri vazetojn da akvo.

Riĉaj artaj fruktoj rekompencis lian strebadon. Per libera imagoriĉa pentrado li kreis sian propran stilon. Li kunfandas siajn riĉan vivobservon kaj solidan artan bazon kaj faras siajn verkojn kuriozaj kaj imponaj. Li donas grandan atenton al plum-uzo kaj aplikas diversajn tuĉoteknikojn, tiel ke liaj pentraĵoj montriĝas antikvecaj, elegantaj kaj hŭmuroplenaĵoj.



En bela aŭtuno

Sur lia pentraĵo “Vulturo kaj Pino” staras forta vulturo sur maljuna kurba pino. Ĝi, kun akraj beko, ungoj kaj okuloj kaj fortaj flugiloj, montras sin aroganta kaj grandadigna. Ĝi impresas per imponeco kaj inspiro.

Lia pentraĵo “Bambuoj” surhavas nur dekelkajn dikajn bambuojn, tamen ilia formo reliefe prezentas la fortan kaj neflekseblan karakteron de bambuoj.

Sur lia pentraĵo “Testudo kaj Gruo” gruo staras sur unu piedo en senzorga humoro; la testudo kun levita kapo aspektas energio-plena kaj kurba pino staras flanke. La bildo impresas antikvece kaj vivovere.

Nun li estas fama juna ĉinstila pentristo. Li faris pli ol mil pentraĵojn. Liajn verkojn kolektas belartaj amatoroj de dekelkaj landoj, kiel Japanio, Usono, Francio kaj FR Germanio. *Renmin Ribao* (Popola Ĵurnalo), *Guangming Ribao* (Ĵurnalo Lumo), *Zhongguo Qingnian Bao* (Ĵurnalo Ĉina Junularo) kaj aliaj kelkdek centraj kaj lokaj ĵurnaloj kaj gazetoj publikigis liajn pli ol cent verkojn. La Centra Televido dissendis televidan filmon speciale pri li. Nun li preparas individuan pentraĵo-ekspozicion okazontan eksterlande en 1986. La famaj ĉinaj pentristoj kaj kalfrafo Li Kuĉan, Ŝu Tong, Fan Zeng kaj aliaj donis al li varman direktadon kaj kuraĝigon. Sinjoro Li Kuĉan skribis kuraĝigajn vortojn sur lia pentraĵo: “La pentraĵo gustoplena kaj la aŭtoro promesplena.”

Li famiĝis. Pli kaj pli multaj vizitas lin. Iu volis aĉeti lian pentraĵon “Bambuoj” por 2 000 ĵuanoj (ĉ. tri ĵuanoj egalas unu usonan dolaron). Li rifuzis tion,

dirante: “Al arto mi strebas. Kaj plie, mia pentrarto ankoraŭ ne estas perfekta. Mi kuraĝigos min ĉiam per malriĉeco. Arto ne konas limon. Mi ne haltos, ĝis mi atingos la celon.”

Iuj legantoj eble jam vidis liajn pentraĵojn. Li faris por nia revuo dekelkajn ilustraĵojn. La kovrilo de la romano “Montara Vila-

ĝo” de la fama ĉina verkisto Chun-Chan Yeh en Esperanta eldono estas projektita de li. Estas lia verko ankaŭ la bildo “Fazanoj en Ruĝa Foliaro”, kiu surhavas vortojn de Fan Zeng. (Vd. la dorskovrilon de EPC, n-ro 6, 1984.)

Li nomiĝas U Dongkuj kaj havas apenaŭ 30 jarojn.



“Testudo kaj Gruo” (Ĉinstila pentraĵo)

DOMMASTRINO KAJ EDZINO

Fotoj de ŬANG ĜJAN

Mia amiko Ĝjan Ĉong havas lertan edzinon kaj obeeman knabon. Ili vivas feliĉe.

Antaŭ nelonge ili transloĝiĝis. Pro tio mi vizitis ilin. Ilia loĝejo ne estas granda, tamen bone meblita kaj bele ornamita. En ilia domo mi sentis min kvazaŭ en malgranda arta mondo. La mastrino laboras kiel belarta redaktoro. Ŝi iras al sia redakcio unu aŭ du fojojn ĉiusemajne

por ĉeesti kunvenon aŭ trakti oficajn aferojn. Ŝi laboras preskaŭ ĉiutage en sia hejmo kaj pentras kelkfoje en antaŭurbo. Krome, ŝi devas zorgi ankaŭ pri ĉiuj hejmlaboroj, ekzemple, prepari manĝon, eduki la infanon k.a. Vere ŝi povas esti nomata hejma "ĉefministro".


Mi faris fotojn pri ŝi. Eble ili povas speguli iom el la vivo de la junaj ĉinaj dommastrinoj.

En legomvendejo





En la redakcio



Ŝia infano en matenmanĝo


Ankaŭ tio estas agrabla.





En ripoztago

Ŝi aĉetas novan botelon da gaso dum oficvojaĝo de ŝia edzo.



Dum preparado de manĝo ŝi gustumas.

Kaprico de la pluvo

(Mikronovelo)

Plumbaj nuboj fortimigis plejparton de la ekskursantoj kaj la loko sin plaĉigis per aparta kvieto. Li iris laŭ rivero. Estis neniu vento. Vergoj de salikoj falis malsupren ĝis la riversurfaco. La ŝvela rivero fariĝis preskaŭ samnivela kun la herboriĉa bordo, kaj la akvo en la larĝa riverkurbiĝo estis tiel glata kiel spegulo.

Distriĝis gajaj knabinoj antaŭe. Tamen ili ne rompis la kvieton. Ĉu ili ne timis pluvon?

Pluvo faladis nek haste nek lante, frapetante la akvon de la rivero. La delikataj herboj kliniĝis sub la atako de la pluvo.

Ekventis. La pluvo faris pli fortan bruon sur la herbejo. Ekplodis pli laŭta rido de la knabinoj. En la bruon de ilia kurado enmiksiĝis de tempo al tempo gaja akuta krio.

Ne malproksime estis kiosko. La knabinoj kuris en ĝin, ĉar la pluvo fariĝis pli forta.



Estiĝis pli forta rumoro. Kaj lia apero energiigis ilin en la ŝercado. Ili ŝercis unu kun alia kaj senbridigis la ridegon. Ŝajnas, ke ili tute ne rimarkis la ĉeeston de la nekonata junulo. Baldaŭ li sentis sin ĝenata.

Plaŭdis la pluvego. Eksonis tondro post nuboj. Baldaŭ ĉesos la pluvo. Li apogis sin sur balustrado de la kiosko. Ankoraŭ petolis la knabinoj. Li ne povis rigardi ilin, tamen li trovis, ke du el ili estas tre bonaj. Unu el ambaŭ, en blanka jupo, montriĝis pli kvieta kaj ŝajne rimarkis lin.

Ĉesis la pluvo. Li iris el la kiosko supren al monteto.

Denove ekpluvis, kiam li atingis la monttalion. Li tuj ekkuris en galerion de steleoj. Tie estis li sola. La monto aspektis pli ĉarma en pluvo. Susuris la pluvo. La diafanaj pluvfadenoj ricevis verdon de la monto.

Alportiĝis de la vojeto rido de la knabinoj. Inter branĉoj kaj florplantoj flagris iliaj buntaj figuroj. Ili kuris rekte al la galerio. Tuj ili okupis la lokon.

Jam ne estis la unua renkontiĝo, kaj li klopodis sin ŝajnigi indiferenta. Ŝercu, ridu, kaj fakte vi ne ridas min, kaj mi ne bezonas zorgi... sed post nelonge...

“Nu, ĉu ankoraŭ ne sufiĉas por vi?” eksonis milda voĉo. Li



trovis, ke diris ĝuste la knabino en jupo. Ŝi paŭtis kontraŭ siaj kamaradinoj. Tamen tio ne haltigis la ridadon, sed male, vekis pli fortan rumoran ridegon. Nun ruĝiĝis ne nur la junulo.

Feliĉe, ĝuste tiam ĉesis la pluvo. La knabinoj elflugis el la galerio, postkuris unu alian kaj disigis kun ĝojbruo.

Kiam li atingis la kulminon de la monto, denove pluvegis. Li tuj sin pafis en la kioskon sur la

kulmino. Kia pluvo! La arbaro sur la monto vaporis per blanka fumo. Ho, li vidis ŝin. La knabino en blanka jupo kuris en tiu ĉi direkto. Evidente ŝi perdis la kunulojn. Sur la kulmino nur la kiosko povis servi kiel ŝirmejo. Forte ekbatis lia koro.

Li fiksas sian rigardon sur ŝia pli kaj pli proksimiĝanta figuro. Ŝi baldaŭ atingos. Ŝi trovos ne niun alian ŝirmejon, se daŭros la pluvo. Sur la montosupro estis

nur tiu kiosko... ankaŭ ŝi vidis lin.

Subite eksonis sinsekvo da tondroj, simile al disfalado de domo. La pluvo ĉesis. En palpebruma daŭro malaperis la lasta pluvoguto...

Li vidis, ke ŝi haltis. Ŝi levis la vizaĝon flagrantan per rideto kaj pluveroj kaj ekrigardis al la ĉielo.

(Esperantigis Ŭang Ŝijong)

KORESPONDI DEZIRAS

- * Maljunulo, kiu fotografas bestojn, birdojn, florojn kaj naturon, kaj pentras sur porcelanon, deziras korespondi. Adreso: Bengt Hallin, Abbekasgatan 10 C, S-214 40 Malmo, Svedujo.
- * La esp-ista junulargrupeto en Leipzig (GDR) alvokas ĉiujn esp-istojn traduki popolajn fabelojn. Sendu ilin al: Kulturbund der DDR, Bezirksleitung Leipzig, Jugendgruppe Esperanto, GDR-7010 Leipzig, Kathe-Kollwitz-Str.115. Ĉiujn kontribuojn ni uzos, kelkajn ni aperigos en Saksa Kuriero kaj multajn ni premios per jarabono de tiu ĉi ĵurnalo.
- * Geiranoj (15-35j.) dez. kor. tutm. pri ĉiuj temoj kun ĉiuj aĝaj ges-anoj. Ĉiuj leteroj estas bonvenaj. Via adreso aperigos en nia monata revuo "Ŝiraza Espero". Skribu al la Omid Kultura-Asocio, P.O. Box 749, 71365 Shiraz, Irano. Vi ricevos ekzempleron de nia revuo senpage.
- * Rondo Kato por ĉiuj katposedantoj kaj ŝatantoj atribue ĉiaj ebloj je la kato. Skribu, planu kaj utilu niajn internaciajn agadmultecojn. Pertti Tormala, Kirkkolatu, 9, SF-06100 Porvoo, Finnlando.
- * 17-jara Ngangu-Md. Moliere, 27, Rue de Madimba no. 27, Kim, N'Djili Q6, Zairio, deziras korespondi tutmonde.
- * Mezaĝulino deziras korespondant(in)ojn ĉinajn antaŭ Kongreso: Jean Smythe, 48 Columbia Place, Calgary, Alberta, T2L0R5, Kanado.
- * S-ro Ryszard Swiergocki, Slowackiego 64 6, Jelenia Gora, Pollando, dez. kor.
- * 18-jara junulo (sportisto), deziras korespondi kun geesperantistoj tutmonde, Muhamed Karahodzic, Rakovcani 5, 79000 Prijedor, Jugoslavio.
- * 15-jara hungara knabino Gabriella Mester, Nyiregyhaza, Pipacs ut 107, 4405 Hungario, vol. kor. kun ĉinaj esperantistoj.
- * 20-jara studento Mehran Khakpour, 236-Ferdowsi ST 11, Shahin Shahr-Esfahan, Iran, vol. kor. pri ĉiuj temoj, precipe pri medicino.
- * 35-jara infana pedagogo deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj, interŝanĝante bildkartojn. Sonja Senj, p.k.16, BG-5000 Veliko Tirnovo/Bulgario.
- * 27-jara elektronikfaklaboristo, dez. kor. tutmonde, kol. bk., esperantajojn. Bernd Mann, GDR-7024 Leipzig, Baunackstr. 3.
- * 36-jara scienca agronomo deziras interŝanĝi maksimum-kartojn kaj bildkartojn kun samhobiuloj tutmonde: Leonid Senj, Poŝtenska kutija 16 BG-5000 Veliko Tirnovo, Bulgario.
- * Mi volas korespondi pri diversaj temoj esperante, rumane kaj hungare: 16-j. knabo Eross Lajos, Frumoasa 11, R-4155, Harghita Rumanio.
- * 19-jara Nagy Terezo, Belso 1255, Joseno Harghita 4206, Rumanio, dez. kor. tutmonde pri muziko, sporto kaj literaturo, esperante kaj hungare.
- * 53-jara sperta esperantisto kun pluraj interesoj deziras korespondi pri diversaj temoj, ankaŭ pri ĉiutaga vivo. Jerzy Dembicki, Daszynskiego 1/34, 33-300 Nowy Sacz, Pollando.
- * 31j. instruisto dez. kor. tutmonde, int. pri vojaĝo kaj infanlibroj kaj kol. insignojn. Tiu, kiu sendas al mi insignojn, ricevos egalan nombron da germanaj insignoj. Christian Paapenmeiev, GDR-9156 Delsnitz Db. Hauptstr. 104.

第二十一课
Dudekunua Leciono

在宾馆里
En hotelo

Ofte uzataj vortoj

这是您的房间
行李放在哪儿
您有事情吗
脏衣服要洗一下
附近有没有邮局
电话怎么用
顺便问一下
什么时候开饭

zhèshì nín de fángjiān
xínglǐ fàngzài nǎr
nín yǒu shìqing ma
zāng yīfu yào xǐ yī xià
fùjìn yǒu méiyǒu yóujú
diànhuà zěnmē yòng
shùnbìan wèn yī xià
shénme shíjiān kāifàn

jen via ĉambro
kien meti pakajon
ĉu vi havas aferon
malpuraj vestoj bezonas lavon
ĉu troviĝas poŝtejo proksime
kiel uzi telefonon
okaze demandi ion
kiam ekfunkcias restoracio

Dialogo

A: 先生，这就是您的房间。

A: Xiānsheng, zhè jiùshì nín de fángjiān.
sinjor-, tio est- via ĉambro-

A: Jen via ĉambro, sinjoro.

B: 谢谢。

B: Xièxie.
dank-

B: Dankon.

A: 行李您要放在哪儿?

A: Xínglǐ nín yào fàngzài nǎr?
pakaj- vi vol- met- kie

A: Kien vi volas meti la pakajon?

B: 就放在这儿吧。

B: Jiù fàngzài zhèr ba.
met- en ĉi tie

B: Metu ĝin ĉi tien.

A: 您还有别的事情吗?

A: Nín háiyǒu biéde shìqing ma?
vi ankoraŭ hav- ali- afer- ĉu

A: Ĉu vi havas ankoraŭ alian aferon?

B: 对了，有几件脏衣服要洗一下。

B: Duìle, yǒu jǐjiàn zāng yīfu yào xǐ yī xià.
jes, hav- kelk- malpur- vest- dev- lav-

B: Jes, mi havas kelkajn malpurajn vestojn,
kiuj bezonas lavon.

A: 请把脏衣服放在洗衣袋里。

A: Qǐng bǎ zāng yīfu fàngzài xǐyīdài lǐ.
bonvol- malpur- vest- met- en lav- vest-
sak-

A: Bonvolu meti la malpurajn vestojn en
la sakon por malpuraj vestoj.

B: 这个电话怎么用?

B: Zhège diànhuà zěnmē yòng?
ĉi tiu telefon- kiel uz-

B: Kiel uzi ĉi tiun telefonon?

A: 打外线电话得先拨个“0”，再拨您要的
电话号码。

A: Dǎ wàixiàn diànhuà děi xiān bō ge líng,
zài bō nín yào de diànhuà hàomǎ.
telefon- ekster- lini- dev- mov- nul-, poste

mov- via bezon- telefonnumer-
 A: Se vi volas telefoni eksteren de la hotelo, uzu unue nulon kaj poste vian bezonatan telefonnumeron.
 B: 顺便问一下, 餐厅什么时候开饭?
 B: Shùnbìan wèn yī xià, cāntīng shénme shíjiān kāifàn?
 okaz- demand-, restoraci- kiam ekfunkci-
 B: Okaze mi demandus, kiam la restoracio

ekfunkcias?

A: 早饭七点, 午饭十二点, 晚饭十八点。
 A: Zǎofàn qī diǎn, wǔfàn shí'èr diǎn, wǎnfàn shíbā diǎn.
 matenmanĝ- sepa, tagmanĝ- dekdua, vespermanĝ- dekoka
 A: Matenmanĝo komenciĝas je la sepa, tagmanĝo je la dekdua kaj vespermanĝo je la dekoka.

Klarigoj:

1. 对了 ĉi tie esprimas subitan rememoron pri io, kion oni devas fari aŭ diri.
2. 先...再 esprimas sinsekvajn du agojn. 先 signifas "unue" kaj 再 "poste".
3. 得 (prononcu dei) estas uzata ofte en parolo por la senco "bezono".
4. 一下 estas nombro uzata ofte por montri fojon de ago. 一下 uzata post verbo esprimas l^a mallongecon de ago.

Emajlita bronza elefanto kun vazo surdorse

Artikolo de SJU ĈJISJAN

Foto de HU ĈUJ

La emajlita bronza elefanto kun vazo surdorse, kiel ornamaĵo de palaca domo en Ĉing-dinastio, konserviĝas nun en la Muzeo de la Imperiestra Palaco en Pekino. Ĝi altas 171 centimetrojn, longas 120 centimetrojn kaj larĝas 60 centimetrojn. La elefanto estas kolore emajlita. Ĝia tuta korpo surhavas desegnitajn nubojn kaj

sur ĝia dorso estas selo kun desegnoj similaj al drakoj kaj nuboj. Ĝiaj antaŭa kaj malantaŭa partoj estas garnitaj per kvastoj. Sur la selo sidas vazo kun bronza torĉo sur la kovrilo. La elefanto, staranta sur emajlita ortangula soklo, aspektas impona kaj forta. La artaĵo estas elegante farita kaj versimila kun delikataj desegnoj. Ĝi envi-

cigis inter la plej bonaj emajlaj artaĵoj de Ĉing-dinastio. La elefanto simbolas feliĉon kaj pacon kaj la vazo kun greno abundan rikolton kaj riĉan vivon de la popolo. La artaĵo estis farita en la regperiodo de Ĉjanlong en Ĉing-dinastio. En 1776 la gubernatoroj de Gŭangdong kaj Gŭangŝji donacis ĝin al imperiestro Ĉjanlong.



Emajlita bronza elefanto kun vazo surdorse

815 W



世界语《中国报道》一九八六年第三期（本刊代号：二——九一五）北京市期刊登记证第692号